

Tra la Mondo

Tutmonda ilustrata Revuo esperantista

TRA-LA-MONDO-ESPERANTO-SEMAS-SIAJN-BONAJOJN-
PLI-FACILIGAS-LA-KOMERCAJN-INTERILATOJN-KONIGAS-
LA-INDAJN-ELTROVOJN-KUNHELPOS-POR-ANSTATAVI-
DE-FRUKTOBONA-PAGO-LA-SANGAJN-BATALADOJN-
KIUJ-DISSTRAS-HOMARON.



Alegorio speciale verkita de Sinjoro Pillel, fama gravuristo de medaloj, sendita en la francau Roman lernejon post ricevo de l' granda premio.

Jara abono : 8 frankoj, ĉiulande. — Kvaronjara abono : 2.25 fr. — Unu kajero : 0 fr. 75 c.

ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

Paĝo.

Nuntempaĵoj: Oktobraj detruoj en Ruslando, de Dr ^o Morgan (Rusujo)	113 ^a
Pri Esperanto: Kroniko, de Steleto	115 ^a
Esperanto, religio, filozofio, de Abato Peltier (Francujo), Lt ^o Kolonelo Pollen (Anglujo), Pastro Schneeberger (Svisujo)	116 ^a
Literatura paĝo: Malbona volo, de Leo Belmont (Polujo)	117 ^a
Komerco kaj Industrio: La « Suk », de H. N., el la Kartaga Instituto (Tunisujo)	118 ^a
Infana paĝo: La Fratinoj, de Frin ^o O. Prudent	119 ^a
Diversaĵoj: La vivado de teoplantisto en Hindujo, de A. T. Simper (Anglujo)	120 ^a
Virina paĝo: La puntfarado en Anglujo, de C. Rust, el Soham (Anglujo)	122 ^a
Diversaj sciencoj (Fiziologio): La Spontanea generado, de M. Finot (Francujo)	123 ^a
Militistaro kaj maristaro: La malnovaj soldatoj en Svedujo, de J. Lundgren (Svedujo)	124 ^a
Felietono: Judith, de Frin ^o Oxenford (Anglujo)	126 ^a
Miksaĵoj: Ludoj, konkursoj, amuzajoj, k. t. p... de Ch. Brunet	128 ^a

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

Miksaĵoj, t. e.: ludoj, amuzajoj, problemoj kaj solvoj devas esti sendataj al S^o Brunet, 59, Cours Victor Hugo, Bordeaux, (France).

Manuskriptoj, kaj mendoj KUN MONO al:

Administranto de « Tra la Mondo », 15, Boulevard des Deux Gares, Meudon (S. et O), France.

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn, plenvalore.

Oni povas ankoraŭ ricevi, « Tra la Mondo » de l' unua numero. Rapidu mendi la luksan eldonon sendatan en tuboj (10 fr. ĉiujare).

Esperanta kaj ne esperanta gazetaro.

Denove ni havas la agrablan devon danki gazetojn kaj revuojn parolintajn favore por ni. Plezurege ni vidas ke oni ŝatas la direktadon donatan al « Tra la Mondo », pri kiu multe insistas, kelkaj nomante ĝin « *familian folion* »; dankon al la bonega « Germana Esperantisto » kaj al nia nova sveda kunfrato « Esperantisten » tiel atentigi siajn legantojn pri la plenumo de l' plano, kiun ni trudis al ni komencante la eldonon.

Aliaj rimarkigas la intereson de iaj artikoloj de « Tra la Mondo » por siaj sampatrujanoj, ekz. « The British Esperantist » kiu, kun « The British esperanta asocio », donas tiel energian antaŭenpuŝon al Esperanto en anglalingvaj landoj. (La kurbo de nia 7^a numero montris la belegan rezultaton de tiu agado). Eĉ la grava mondfama revuo « Reviews of Reviews » ne restis sensenta antaŭ « Tra la Mondo, the beautifully illustrated Esperanto monthly. » Ĝi jam kelkafoje raportis por ĝi, dirante aparte en la lasta artikolo: « La kristnaska numero estas speciale *delightful* (ĉarmplena) ». Speciale atentinda por ni estas tiu ne komuna laŭdo, devenanta de tia ŝatata revuo, kia nia granda angla kunfrato.

« L'Esperantiste », « Esperanto », « Ruslanda Esperantisto », « Espero Katolika », « Suno Hispana », havas ankaŭ rajton je niaj dankoj, pro ilia senĉesa helpo.

Ĝi vidigas ke ili ankaŭ komprenas ke eldono de « Tra la Mondo » estas ja grava okazintaĵo, montranta nian ĉiam progresan antaŭeniradon. Do kun iom da miro ni vidis, en la 1^a Januara numero, ke tiu fakto estis juĝita tute neatentinda

de la redakcio de « Lingvo Internacia », ĉar neniam ĉi tiu estas farita pri « Tra la Mondo », ĉu en la nomaro de l' *gazetoj* nove kreitaj, ĉu en la fako rezervita pri la *Speciale internaciaj progresoj* dum 1905 !!

Fine kelkaj francaj gazetoj aludas, pli malpli longe, pri ni; iuj kiel « L'Union républicaine », organo de l' Suda Francujo, enpresas regule nian enhavon. Tio estas bona afero ĉar ĉiuj regionaj ĵurnaloj estas paroliloj de politikistoj. Ni do havas intereson gajni ilin al nia afero, ĉar per la paroliloj ni ĝajnos la parolantojn. Nu, ni ne ĝin forgesu, pli kaj pli ni alproksimiĝas la epokon dum kiu ni bezonos oficialan helpon, por trafi oficialan alprenon.

Tia Revuo kia « Tra la Mondo » povos utili en tiuj okazoj. Por doni nur unu ekzemplon, ni ricevis afablan dankon de S^o Eugène Schneider, la fama direktoro de « Creusot », pri la artikolo enpresita en nia 6^a numero. Memorigante ke S^o Eugène Schneider estas deputito, ni povas diri ke nia talenta kunlaboranto Pr^o Bord, per siaj artikoloj kaj parolado (aŭskultita de ĉirkaŭe 1000 personoj) « fit d'une pierre deux coups » t. e. trafis samtempe du celojn; kaj ni ĝojas pri la helpo al li donita de nia gazeto.

Se vi bonvolas konsideri, karaj legantoj, ke vi estas jam abonintoj, vi konvinkigos ke, verkante la antaŭajn liniojn, ni celas nur vin atentigi pri profitoj riceveblaj de konvena uzo de via revuo, por kiu uzo nur iom da peno sufiĉas.

A. M.

En la 9^a N^o komencos LA TORENTO EL SAŬMO, de DANIEL LESUEUR, la fama romanistino.


BALDAŬ APERONTAJ:

Turka rakonto, de Oreŝkov (Bulgarujo); la plej norda scienca instituto de la mondo, de K. Gutke el « Esperantisten » (Svedujo); Rubens, de Van der Biest-Andelhof (Belgujo); Jiu-Jitsu, japana Sporto; la fortikaĵo de Schlüssenburg, la rusa « Bastille », de Dr^o Morgan (Rusujo); virina laboreto kun modelo, de Johanino Flourens (Francujo); la Subtervojo de Simpson, de J. Meazzini (Italujo); Teatro; k. t. p.

Baronino von Süttner,

laŭreatino de l' Nobela premio, la mondfama pacifistino, bonvolis permesi tradukon de unu el siaj verkoj, kiun ni baldaŭ presigos kun la subskribo de l' agema kaj klera frankfurta propagandisto, Dr^o Hanauer, ano de l' Lingva Komitato.

NUNTEMPAĴOJ



Laŭ rusa

poŝtkarto

EN ODESSA. 17/30. VI. 1905

La korpo de mortigita ŝipano de l' militŝipo « Princo Potjomkin — Favričeskij », Vakulmčuk, sur la nova digego en Odessa.

Oktobraj detruoj en Rusujo

De Doktoro MORGAN (Rusujo).

La datreveno de l' sanga tago 22^a de januaro 1905 okazis, ĝojinde, en la plej plena trankvileco. La modereco de l' laboristaj delegitoj kiuj nur instigis la loĝantaron elmontri sian funebbron, fermante la pordojn de siaj domoj kaj estingante ĉiujn lumilojn, kaj la antaŭzorgaj disponoj de l' regnestraro malhelpis ĉiujn bedaŭrindaĵojn. La malantaŭen rigardo pri tiuj de oktobro, de okulvidinto, certe interesos niajn legantojn.

Ĉefa ofero de oktobraj detruoj estis — aparte en Sudruslando-hebrea loĝantaro. Dum la dua duono de oktobro, hebreaj detruoj disludigis en pli ol 120 punktoj. Inter hebrea loĝantaro tiuj ĉi detruoj lasis post si milojn da mortigitoj, dekojn da miloj da vunditoj, centojn da miloj da ruinigitaj homoj. Nur en Odessa estis mortigataj ĉirkaŭe 500 Hebreoj kaj kripligitaj ĉirkaŭe 5000. En Ekaterinoslav mortigitajn Hebreojn oni kalkulas ĝis 170. En urbeto Kalaraŝ (Besarabia gubernio) estis buĉataj 60 Hebreoj kaj multvunditaj, 80. En urbeto Orŝa (Mogiljova gubernio) estis mortigataj 30 Hebreoj, k. t. p., k. t. p.

Detruoj ĉirkaŭkaptis preskaŭ la tutan teritorion Ruslandan, escepte Polujon k. apud Baltaj provincoj. En du sudaj gubernioj (Ĥersona k. Ekaterinoslava) detruoj ricevis rekte seninterrompan karakteron kaj disvastigis en ĉiujn distriktojn escepte nur unu: Novomoskva. Ĉiuj grandaj urboj de tiuj ĉi gubernioj estas detruitaj tute aŭ parte; en multaj malgrandaj urbetoj estas detruitaj k. bruligitaj ĉiuj

hebreaj domoj. En internaj kaj Siberiaj gubernioj, kie la hebrea loĝantaro estas tre malmultenombra la unuaj ekbatoj de la detruantoj estis direktataj sur la rusan progreseman inteligentularon.

Bruligo de centoj da homoj en Tomsk (Siberio), kruela elbato de zemstvanoj (1) en Tver (centra Ruslando); multenombraj okazoj de elbato k. mortigo de studentoj en Moskvo k. en aliaj urboj. Ĉio tio ĉi estas nur apartaj epizodoj de detruadoj, kiuj havis lokon en multenombraj punktoj.

Detruoj preskaŭ ĉie fariĝis samtempe k. eĉ ilia iro estis preskaŭ sama. En ĉiuj grandaj urboj la publikigo de l' reĝa manifesto de 17/30 de oktobro akompaniĝis de pacaj manifestacioj de amasoj el loĝantaro solenigantaj la venkon de l' popolo kaj la proklamon de l' komencoj de la libereco. Tuj post tiuj ĉi manifestacioj aŭ eĉ samtempe kun ili ĉie, aŭ preskaŭ ĉie, komenciĝis aliaj, pseŭdo-patriotaj, pli ĝuste aŭtokrat-monarhiaj manifestacioj konsistantaj preskaŭ nur el malkleraj surfundaĵoj de la

(1) Zemstvo estas preskaŭ netradukebla vorto. Laŭ rusa-franca vortaro de sinjoro Makaroff, la vorto zemstvo signifas « les états provinciaux » (provincaj statoj), zemstvano — « le greffier du village » (vilaĝa registristo), zemstva — « territoire provincial » (teritorio provinca) k. t. p. (Remarko de l' aŭtoro).



EN S^t PETERBURGO, 22, I, 1905
Grupo de laboristoj, kun petskribo al Caro, sur la palaca placo. Antaŭe, pastro Gapon.



DUM LA RUSA REVOLUCIO
Kozakoj atakas grupon de laboristoj ĉe kafeja teraso, dum la oktobra ĝenerala striko.

societo pretaj, ricevinte unu frankon k. glason da brando, por ĉiu krimo, k. el membroj de la polico; kaj fariĝintaj sub gardo de polico k. de l' militistaro. Ĉie, au preskaŭ ĉie, tiuj ĉi lastaj manifestacioj aliĝis en sovaĝajn detruojn. Detruantoj aranĝadis elbatojn sur la stratoj, penetradis perforte en magazenojn k. loĝejojn, disŝteladis komercaĵojn kaj havaĵojn, turmentadis, kripligadis kaj mortigis homojn, maljunulojn, infanojn kaj virinojn, malvirigis neplenjarajn knabinojn. Ĉiuj tiuj ĉi teruroj de sovaĝa rabo k. sovaĝbesta perforto fariĝadis kun silenta k. eĉ videbla aprobo de l'agentoj de aŭtokrata registaro, kun la rekta helpo de polico kaj militistaro.

La loka administracio k. la polico ludis tute difinitan rolon en kreado de la detruoj; la polico disemis sensencajn fabelojn pri agado de la revoluciistoj k. Hebreoj, penante per tiu ĉi rimedo krei kontraŭ ili koleron en larĝaj amasoj de l' loĝantaro; k., ne sin limigante ĉe tio ĉi, alkuradis al rekta instigo (*fr. provocation*). Polico kolektadis k. organizadis inter malkleraj amasoj popolaj bandojn de detruantoj; k. de la polico ili, en multaj lokoj, ricevadis batalilojn. Plue, policianoj, ĝendarmoj, k. kozakoj civile vestitaj k. eĉ en uniformo, gvidadis ofte detruantojn proprapersono, direktante ilin en difinitajn lokojn kaj al difinitaj personoj.

Bandoj de aktivaj detruantoj, en la plej granda parto je la okazoj, ne estis tre grandaj; k. preskaŭ ĉie oni estus povinta facilege ilin diskurigi per penetoj, ne nur de polico k. militistaro, sed eĉ per tortoj de mem sindefendantoj de tiuj grupoj de loĝantaro, kontraŭ kiuj ili sin direktadis. Tio ĉi tamen ne okazis, tial ke detruantoj ĉie trovis por si subtenon de militistaro ricevinta, evidente, tutajn

difinitajn instrukciojn. Ĉiun fojon, kiam detruantoj kaj polico devis reiri antaŭ sindefendantaro, sur la scenon aperadis militistaro kiu mortpafadis sindefendantaron kaj senbarigis la vojon por la detruantoj; kaj poste tiu ĉi militistaro restadis kvazaŭ indiferenta rigardanto de raboj, perfortoj k. mortigoj.

Tiel oni faris la oktobrajn nigrajn detruojn kovrintajn de sango la tutan landon; kaj ĉiuj tiuj ĉi faktoj firme konstatitaj de multenombraj montroj de oferitoj kaj okulvidintoj de detruoj, ne lasas iujn ajn dubojn pri tio, kio estis efektiva kulpulo de tiu ĉi malpura k. sanga afero, kiajn celojn ĝi persekutis. Per malpura ondo de detruoj oni volis haltigi kaj ekbari la leviĝintajn ondojn de la revolucio. Detruoj aperis kiel peno de pereanta malnova reĝimo por terurigi la loĝantaron kaj nuligi per malfacilega batalado ĉiujn liberojn al milititajn de Ruslandaj popoloj kaj proklamitajn de la manifesto de 17/30 oktobro. Organizado de tia peno apartenis al l'administracio aginta laŭ unu komuna kaj, oni devas pensi, kredeble, antaŭdifinita plano.

Sian rektan celon tiu ĉi peno ne atingis, sed detruoj tamen efektiviĝis kaj lasis post si teruran postsignon. Montoj de homaj malvivuloj, miloj da orfigitaj familioj, amaso de homoj senigitaj je ĉiuj rimedoj de ekzistado, malĝojo kaj kolero en larĝaj amasoj de la loĝantaro, tia estas tiu ĉi malĝojega postsigno.

Malnova reĝimo alkurinta por sia savo al l'organizado de bandoj de detruantoj, al amasbuĉado, mem sanktigis la revolucion k. altiris al si senreturitan komdamnon.

Por « TRA LA MONDO »
de D^{ro} MORGAN, Rusujo.

Ofte kontraŭ propagandistoj stariĝas mallarĝaj spiritoj dirantaj « Esperanto utilos por tiu aŭ alia religio aŭ filozofio — kompreneble ne tiu de l' kontraŭdiranto — kaj mi ne volas ĝin helpi helpante Esperanton » La kurioza paĝo 116^a liveros bonegan armilon kontraŭ tiajn personojn. Ĝi enhavas efektive opinion favoran por Esperanto de tri homoj egale honorindaj, kaj atentindaj same religie aŭ filozofie kiel esperante. Plezure « Tra la Mondo » liveras ilian ŝatindan opinion al siaj legantoj.

PRI ESPERANTO

Esperantista movado en Svedujo kaj Rusujo. — Bibliografio: «Dektriope», de Grafo A. Gallois. — «Oficiala protokolaro de l'unua Kongreso universala de Esperanto.» — «Esperantisten», nova sveda propaganda revuo.

La naciaj revuoj aŭ niaj privataj korespondantoj alportas al ni bonegajn sciigojn pri la disvastiĝo de nia afero. La jenaj eltranĉaĵoj de ricevitaj leteroj montras la bonan manieron laŭ kiu kelkaj klopodas por Esperanto, penante montri al ĉiuj la utilon, kiun ĝi prezentas por ili, aparte ĝian efikecon por diskonigi iujn landojn, kies lingvo estas konata de malmultaj. Jen estas, ekzemple, leterero skribita al nia ĉefredaktoro.

Stockholm, la 12^{an} de Januaro 1906.

Tre Estimata Sinjoro,

«Mi dankeme akceptis vian estimatan poŝtkarton per kiu vi sciigas al mi, ke vi penados enpresi mian artikolon titolitan «*Movado abstinencia en Svedlando*» kiel eble plej frue. Mi dankas vin pro tio, ĉar unue tiu artikolo sciigas al la alilanduloj la grandajn progresojn idealajn de nia preskaŭ nekonata lando, kaj due tiu artikolo instigas la abstinenculojn lerni Esperanton, kiu baldaŭ fariĝos la sola interkomprenilo de la ĉiulandaj abstinenculoj. Klubo Esperantista Stockholma ricevis novan tre gravan membron nome: la ageman kaj elokventan parlamentanon S^{ron} Edv. Wawrinsky, kiu estas *estro de la tutmondaj bontemplanoj* (adreso: Vasagatan 10 Stockholm) Li oficiale prezentis Esperanton en la abstinencula kongreso en *Budapest*. Tio okazis la 11^{an}-16^{an} de Septembro 1905. La venonta abstinencula kongreso okazos en *Stockholm* en la jaro 1907. Hodiaŭ mi havas la honoron transdoni al vi alian artikolon titolitan «*La plej nova scienca instituto de la mondo*», kiu klare montras la sciencajn progresojn de nia lando. Nun la svedaj scienculoj interesigas je Esperanto. Tio estas granda rekomendo por nia afero. La svedo-esperanta gazeto estos eldonata antaŭ la 21^{an} de Januaro 1906. Esperanto videble komencis jam sian sukcesan periodon en Svedlando...»

KONRAD GUTKE (Svedujo).

Pasante ni rimarkigu la kontentecon de nia korespondanto pro sukceso apud parlamentano. Ĝi pravigas tion, kiom oni povis legi sur nia kovrilo. Jen estas nun interesa resumo sendita de nia kunlaboranto, S^o Porfirjev.

La Esperanta movado en Rusujo dum la 1905^a jaro.

Ĝetante rigardon sur la pasintan jaron, vole nevole mi al mi demandas: do kion alportis al nia kara afero la ĵus pasinta 1905^a jaro? Ŝajnis, ke ĝi ne povis alporti al nia afero ian ĝojindan rezultaton, ĉar okazis la plej malfavoraj kondiĉoj por propagando de nia homara afero en Ruslando. Komuna atento kaj ĉiuj fortoj kaj interesoj estis direktataj antaŭ ĉio al la ĵus finiĝinta terura milito kaj ĝenerale al la komencinta [9 (22) januaro 05 jaro] politika liberiga movado, kiu ĉe la finiĝo de l' jaro iĝis efektiva revolucio, kiam la vivado de lando tute ĉesis; la tutrusuja striko laŭ larĝa ondo trairis tutan Rusujon kaj ŝajnis ke la vivado ekmortis. Kaj jen, malgraŭ malfavoraj kondiĉoj, niaj rusaj, senlaciaj samideanoj ne forlasis nian sanktan aferon. Ili propagandadis Esperanton kaj, oni povas diri, propagandadis kun granda sukceso. — D^{ro} Ostrowsky el Jalta, komencis eldonadi rusa-esperantistan ĵurnalon «*Esperanto*», sed eldonado de ĵurnalo renkontis vicon de neforigeblaj malfacilaĵoj kaj li estis devigata ĉesigi eldonadon de l' ĵurnalo ĝis pli favora tempo. Preskaŭ samtempe la rusa esperantista societo «*Espero*» ankaŭ komencis eldonadon de sia oficiala organo «*Ruslanda Esperantisto*». Ĉi tiu organo estas tre bona; celo de ĝi — ne nur disvastigado de Esperanto (ĉar Esperantismo jam pasis la komencan stacion de ekskluzive sola propagando) — sed, ĝenerale, enkondukado de Esperanto en vivon, uzadante ĝin, kiel ilo de internaciaj komunikoj, por plej diversaj celoj de l' vivo. Redakcio de «*Ruslanda Esperantisto*» lokados sur paĝojn de sia ĵurnalo eminentajn verkojn de nuntempaj rusaj verkistoj, interalie redakcio intencas komenci presadon de unu el la plej bonaj lastaj verkoj de Leonido Andreev «*Ruĝa Rido*». Do de 1906 jaro la redakcio de «*Ruslanda Esperantisto*» enkondukas novan socialfakon, kio sendube aldonos al revuo pli grandan intereson kaj altiros atenton de neesperantistoj.

Krom la apero de du naciaj-esperantistaj revuoj en Rusujo, dum 1905 jaro estis fondataj filioj de «*Espero*», ekzemple, en urbo Voroneĵ kie oni faras esperantistajn kursojn, kaj fine rusa monata ĵurnalo «*Kuriero de Scio*» (Vjestnik Znaniĵa) donis al sia abonontaro, kiel aldonon, bone ellaboritan lernolibron

de lingvo Esperanto kaj, kio estas plej bona, redakcio de «*Kuriero de Scio*», en 1906^a jaro promesis dediĉi al Esperanto grandan atenton kaj enkondukos en la ĵurnalon novan apartan fakon esperantistan. La redakcio profunde kredas, ke Esperanto estas bona potenco, kaj, se oni povas tiel diri, sola rimedo por unuiĝo de laborista klaso de l' tuta mondo; kaj ke neordinara facileco de lingvo ne postulos de flanko de portantoj de l' ideo de tutmonda unuiĝo de proletariato, iajn novajn oferojn; kaj ke, tiel, Esperanto solvas la problemon de unuiĝo por ĉiuj, kiuj havas samajn interesojn. Ni tutkore deziras al redakcioj de «*Kuriero de Scio*», de «*Ruslanda Esperantisto*», «*Esperanto*», kaj al ĉiuj rusaj samideanoj, sukcesojn en la propagando de ideo de internacia lingvo, kaj en la propagando de ideoj homaraj kaj de la homa frateco. Plej rapide alvenu la tempo kiam ĉiu homo vidos en alia homo nur anon de unu homara familio! Ĝi alvenu!..»

A. PORFIRJEV (Rusujo).

BIBLIOGRAFIO.

«*Dektriope*» estas la titolo de tre sprita unuakta salona komedio tute lerte esperantigita de nia kunlaboranto Grafo Albert Gallois, el Rioĵunato (Italujo).

Ĝi estas fondita sur la superstiĉo pri la nombro dektri kaj, laŭ tre amuziga maniero, montras al ni la malfeliĉetojn kaj malesperon de gemastroj kiuj, invitinte gastojn por vespermanĝi, estas ĉiam dektri malgraŭ ĉiuj penadoj por esti dekdu aŭ dekvar. Fine la aferoj aranĝiĝas — ne estus komedio alie —: dum la gastoj manĝas aparte, dekuope, la gemastroj intime, duope, pasigas la datrevenon de sia edziĝo. Ĉar ĝin festi estis la celo de la festeno.

Tiu komedio, kiu konigos al multaj italan kutimon pri la maniero akcepti gastojn, estos ja tre bona ĉefĉesto por esperantistaj festoj, kaj ni tre rekomendas ĝin al niaj legantoj.

Tre interesa estas la «*oficiala protokolaro de la unua kongreso universala de Esperanto*» eldonita de «*Esperantista centra oficejo*».

En ĝi ni legis plezure la nomojn de multaj el niaj kunlaborantoj, inter tiuj de l' anoj de l' lingva komitato.

Soj A. Moiteau kaj K^{lo} Pollen (*Anglujo*); Otto Simon (*Aŭstrujo*); D^{ro} Seynaeve (*Belgujo*); Abato Peltier kaj A. Montrosier (*Francujo*); Borel, Christaller, D^{ro} Hanauer, (*Germanujo*); Codorniu kaj V. Inglada (*Hispanujo*); Thornsteinsson (*Islando*); G^{ro} Gallois (*Italujo*); Beauchemin (*Kanado*); Leo Belmont (*Polujo*); P. Nylén kaj P^{ino} Cederblad (*Svedujo*); Pastro Schneeberger (*Svisujo*).

Tiuj nomoj montras la estimon akiritan de «*Tra la Mondo*» ĉe la esperantista eminentularo. Ili estas garantio, ke ĝi ĉiam kunigos la intereson kaj la korektecon.

Pro manko de spaco ni povas nur citi «*Boleŝejo*» apartan eldonaĵon de «*Ruslanda Esperantisto*», laŭ Maksim Gorĵkij (traduko de Ivan Selezņov). Kaj ni ne volas fini tiun rapidan kronikon ne salutante «*Esperantisten*» la novan svedan propagandilon, kiu ja bonege prezentigas.

Ĝian planon, ni tute aprobas: Unuiĝo de svedparolantaj samideanoj, kaj diskonigo inter ili de sciigoj pri la disvastiĝo de la movado esperanta en ĉiuj landoj.


La ĉefredaktoro estas nia konata samideano P. Ahlberg, sek. de l' Klubo Esperantista Stockholm, ano de l' L. K. kaj aŭtoro de vortaro por Svedoj rimarkinde prezentita.

La ĵus aperinta «*Slosilo*» Ĉefeĉ por Svedoj certe helpos tre utile niajn sindonajn Svedajn propagandistojn. En la lasta N^o de «*Belga Sonorilo*» mi vidis plezure inter premioj disdonitaj de la Antverpena grupo al la lernantinoj de la virina grupo, «*Specialan premion*» konsistantan el unujara abono al «*Tra la Mondo*». Estas senutile insisti pri tiu nova pruvo de la taŭgeco de nia revuo, aparte ŝatinda venanta de l' grava Belga grupo.

STELETO.

Kvankam ĝi estas tre malbela paroli pri si, mi devas diri ke la *Steleto* de «*Tra la Mondo*» kunlaboradas en neniu alia revuo.





ABATO PELTIER.



KOLONELO POLLEN.



PASTRO SCHNEEBERGER.

Esperanto, Religioj, Filozofio.

KATOLIKISMO.

Katolikismo instigas la homaron al *progreso morala*; ĝi celas unuigon de l'homaro en unu vera religio, en sincera frateco. Tial ĉio, kio estas « progreso », devas interesi la Katolikojn. La celo de l' tuta naturo kaj de ĝiaj fortoj devas esti « la servo al homo », la perfektigo kaj plinobligo de l'homo, diris Episkopo Ireland (1). Pereu la negoco, pereu komerco, se la homo devas per ĝi malpli juste senti tion, kio estas rajto; se la homa koro per ĝi devas hardiĝi. Pereu la plej perfekta mekanika eltrovo, se ĝiaj senkonsciaj radoj forigas, en sia senkompata movado, la purecon kaj feliĉecon de l'homaj animoj. La laboro estas malbeno, se per ĝi homo fariĝas sklavo de l' materio kaj al ĝi estas similigita. La riĉeco de l' nacioj estas blasfemo kontraŭ la Kreinto, se tiuj riĉecoj kondukas la posedantojn al egoismo kaj al mallarĝeco de l' spirito: se l'amasigo de riĉecoj kondamnas la popolamason al mizero kaj peko; la multekosta estaĵo estas ja *la homo*; estas *li* tiu, kiun oni devas savi kaj plinobligi: la progreso de l' homo estas la sole vera progreso.

Ĝis nun la materiala progreso multe antaŭiris la moralan: tio estas unu el la plej gravaj kaŭzoj de la bedaŭrinda stato societa en preskaŭ ĉiuj nacioj. Mi estas plene konvinkita, ke la lingvo Esperanto estas la plej potenca helpilo al progresado morala. Tial Katolikismo kaj Esperantismo estas « ideoj-fratinoj »; ili devas reciproke sin kunhelpadi, kaj laboradi unu por l' alia. Latinaĵo daŭru esti la lingvo liturgia kaj oficiala de l' Eklezio. Sed flanke de ĝi, la Katolikoj ricevos grandegan utilon de la lingvo Esperanto, precipe kiam *Espero Katolika* fariĝos 32-paĝa (kredeble en marto 1906^a), kaj poste 100-paĝa revuo. Ili per Esperanto rapidigos l' alvenon de l' dezirinda kaj ĉiam celita unuigo de l' homaro en sankta frateco.

(1) La homara Progreso, parolado ĉe la malfermo de l'Ekspozicio de Chicago en 1892.

Abato E. Peltier,
Prezto de St^o « Espero Katolika »

FRAMASONISMO.

Same kiel Framasonaro estas disvastigita sur la tuta supraĵo de la mondo kaj havas sian centron ĉie, tiel estas la deziro de ĉiuj esperantistaj Framasonoj ke nia kara nova internacia lingvo estu akceptata ĉiuflanke kaj havu ĝian hejmon ĉie!

Estas malnecese paroli tie ĉi pli detale pri la bono kiun la Framasonado faris en la intereso kaj por la kaŭzo de humaneco, de homaro, de frata amo kaj de sincera frateco! Framasono sentas sin, kaj vere estas, ĉie kaj ĉiam, en sia patrujo; sed oni ne povas dubi ke, se la tuta frataro povus paroli unu saman lingvon, la forto por bonfari la tutan komunumon estus vaste pligrandigita. La uzo de komuna lingvo certe helpus forigi kelkajn malkomprenojn, kiuj nuntempe malhelpas ke kelkaj multepovaj aroj da Framasonoj laboru oficiale kune. Sed eĉ se tiu ĉi tre dezirinda rezultato ne povas tiel esti ricevita oni apenaŭ povas dubi ke komuna neŭtra lingvo kapabligos Framasonojn el fremdaj landoj libere interkomuniki unu kun la alia, kun rezultatoj kiuj nepre vidiĝos bonfaraj por la grandaj framasonaj institucioj al kiuj ili respektive apartenas.

Ĉu la diversaj loĝioj (aroj) tra la mondo konsentos alpreni komunan lingvon por iliaj ceremonioj aŭ ne estas iom dube. Tio certe ne estas la unua deziro de Esperantistoj ĉar la nova lingvo ne estas iel intencita por superi aŭ malhelpi la nacian lingvon de ĉiu ajn lando; sed neniu povas dubi ke se membroj de la frataro lernados Esperanton ili estos kapablaj akcepti en siajn kunvenojn fratojn el fremdaj landoj multe pli libere kaj kore ol nun. En la intereso, do, de ambaŭ la oficiala kaj la socia disvastigado de Framasonado, estas dezirinde ke ĉiuj anoj de la frataro agu plej bone kiel eble por kuragi la lernadon de la nova internacia lingvo, kies praktikaj meritoj estas elmontrataj tiel glorie al la mondo en la Boulonja, memorebla kaj rememoriginda Kongreso.

Speciale verkita por « Tra la Mondo » de
L^{to} Kolo Pollen.
Prezto de « Brita Esp. Asocio. »
Anoj de la « Lingva Komitato »

PROTESTANTISMO.

Lingvo kaj religio estas esencaj ecoj de l' homa gento. Tamen tiuj ĉi du ecoj ankaŭ disigas la homojn. La multaj lingvoj kaj religiaj formoj estas la plej grandaj baroj, kiuj malebligas la dezirindan pacon kaj amon inter la homoj de ĉiuj popoloj. Multe da samlingvanoj ne interkompreniĝas, ĉar ili ne havas la saman religion; multe da samreligianoj ne interkonatiĝas, ĉar ili ne parolas la saman lingvon!

Ĉu Esperanto ne povus ludi gravegan rolon en religiaj aferoj? Se ni interrilatiĝas per Esperanto kun alilandanoj kies lingvon patran ni ne konas kaj kies pensojn kaj opiniojn ni kredas esti tute fremdaj kaj eĉ malamikaj al la niaj, kun miro ni rimarkas, ke male ekzistas interkonsento pri gravaj punktoj.

Religio nun estas malnova sento homa, ke ni ĉiuj dependas de plejalta fortego. Tiu ĉi sama malnova sento montriĝas en diversaj konfesiaj formoj ĉe ĉiuj homoj, kiuj ĝin esprimas ĉiu en sia propra lingvo: multaj samkonfesianoj ne interkompreniĝas pro la diverseco de la lingvoj!

Per Esperanto « en la mondon venis nova sento », kaj la sento diras al ni, ke ni ĉiuj estas homoj, fratoj, anoj de unu granda rondo familia. Same ni sentas ĉiuj, nur aliforme, diverslingve.

Antaŭen do, katolikoj kaj protestantoj, ortodoksaj kaj liberpensaj, kristanoj kaj alireligianoj! Alten la korojn! Esprimu niajn malnovajn sentojn en nova lingva formo! Aŭdu ni, kiel same sentas niaj proksimuloj kaj konvinkigu, ke la « nova sento », kiu venis en la mondon, estas la plej malnova sento de l' homa koro: la sento de homaro gefrata, kiu kredas, amas, esperas!

L'esperantoj, ni estu esperantistoj!

Pastro Schneeberger,
Prezto de « Svisa Esp. Societo. »

Rakonteto simbola de LEO BELMONT (Polujo).

Iradas viro de malproksime, ho! de malproksimege. Li iradas tra la tagoj, li iradas tra la noktoj — preskaŭ ne ripozante.

Kuras la ŝvito per fluetoj sur lia frunto sulkigita, sur vizaĝo malgrasiginta, kurbigita pro doloro. Li apenaŭ povis trenadi la piedojn.

Tamen li rapidis... Kaj li alvenis al rivero profunda kaj rapidega, kies bordo kontraŭa apenaŭ, apenaŭ estas videbla pro la malproksimeco. Li ekĝemis... Tranaĝi estas neeblege...

Kaj la celo, ja la celo dezirita de lia vojaĝo estas tie, sur la kontraŭa flanko. Tie estas la oriento, tie desegniĝas, sur ĉielo brila, lumeto malrapide kreskanta ..

Subite la vojaĝanto ekvidis, ekmontriĝanta el la mallumo, je kelkaj paŝoj de li, ponton jetitan super la rivero. Li ĝoje ekkriis kaj direktiĝis ĝis tiu ĉi... Kaj li estis jam enironta, kiam ia grandega nigra fantomo subite baris al li la vojon.

Plena je teruro, li malantaŭenpaŝis...

La fantomo demandis per voĉo mallaŭta:

— Kien vi iras?

La vojaĝanto montris per mano la lumeton:

— Tien, ĝis la lumo!

Ekridegis la fantomo:

— Malveraĵo!

La vojaĝanto ekteremis, direktis sur ĝin rigardon doloran, kaj per voĉo tremanta pro impresado diris:

— Tien mi iras... La lumo min alvokas... Multajn tagojn kaj noktojn mi rapidas al ĝi. Mi svenas pro malsato — sed mi iras. Miaj piedoj estas vunditaj — sed mi iras.

— Vi mensogas — moke zumis la fantomo — via voĉo tremas, ĉar vi mensogas. Vi estas sata kaj sana. Vi mensogas!

Larmoj ekbrilis en okuloj de la vojaĝanto.

— Rigardu miajn piedojn.

Kaj li vidigis ilin. Ili estis ŝvelintaj, vundokovritaj, sangumitaj.

— He! — diris la fantomo — mi vidas nenion eksterordinaran. Negravaj tranĉvundetoj... aŭ... aŭ vi kredeble piedpremris kelkajn berojn vojirante... Ĝi ne estas sango!

La vojaĝanto maldolĉe ekridetis.

— Rigardu do miajn manojn...

Kaj li nudigis malgrasajn manojn de skeleto.

— Hm... hm... — bruetis la fantomo — ili ne estas tro grasaj. Sed tio pruvas nenion. Vi havas bonegan konstitucion. Cetere... vi malsatigas vin memvole por influi sur la fremdan opinion... Vi havas sakon plenan je pano...

La Nekonatulo malfermis la sakon per tremantaj manoj. En ĝi estis nur volvaĵo el malnovaj paperoj.

La fantomo avide kliniĝis sur la sakon.

— Ho! sub la paperoj estas pano — li diris.

La viro elskuis la sakon kaj montris, ke en ĝi estas nur paperoj.

— Bah! — diris la fantomo — vi.. manĝis ĉion antaŭ kelkaj minutoj.

La viro skuis la kapon nee; li profunde ĝemadis kaj silentis.

— Lasu min — subite li diris petege, — lasu min

aliri la duan flankon. Tie estas mia amata lumo. Tie estas la viviga rivero de l' amo, dezirata kaj serĉata... Lasu min iri tien!

— Mensogulo! — ekkriis minace la fantomo. Vi volas iri tien, por... mortigi!

La viro malfermis larĝe okulojn mirantajn.

— Mi? — li ekbalbutis... mi?!... kial ĉi tiu suspekto?

— He! Vi ja havas tranĉilon sub la vestoj. Mi vidas bonege — diris la fantomo. — Vi ĝin havas sur la brusto». La viro per nerva movo mana malbutonumis sian veston sur la brusto.

— Serĉu — li diris...

La fantomo avidege skuadis la vestojn de l' vojaĝanto, sed trovis nenion.

— Bah! vi estas sprita — ĝi diris — vi ĝin kaŝis aliloke... kaŝis perfekte!

La viro metis la manon sur sian koron.

— Mi ĵuras — li diris — ke mi havas nenian malbonajn intencojn. Mi iras al tiu ĉi lumo. Mi iras, ĉar mi kredas, ke ĝi min revivigos... almenaŭ unu minuton, unu minuton. Se mi ne sukcesos ĝin atingi, mi pereos sen konsolo. La koro mortos en mia brusto pro ĉagrenego. Lasu min ..

Sed la fantomo ridis:

— Mi ne lasos, ĉar vi mensogas... Via koro ne mortos, ĉar vi... ne havas koron! Mi ja tute ĝin ne vidas... Jen, prenu mian tranĉilon — kaj montru, ke vi havas la koron... Tiam mi vin eklasos...

La viro ŝanceliĝis nur momente. Poste, per movo energia, li prenis la tranĉilon kaj enigis ĝin profunde en la bruston.

Li falis... sango ekŝprucis.

— Mi trapikis mem mian koron... Vi vidas... Mi mortas... » Sed la fantomo ridis ironie...

— Mi vidas nenion... nenion... Malmulteto da ruĝa suko... Nenion plu...

La mortanto malfermis ankoraŭ unufoje la okulojn.

— Kiu do vi estas? — li demandis. Diru al mi, antaŭ ol mi mortos.

La fantomo respondis:

— Vi ŝajnis morti...

Aŭdata estas nun la terura raŭkado de l' agonianto.

— Vi ŝajnis morti — ripetis la fantomo kaj ĝi kliniĝis super lin.

L' agonianto faris lastan penon, levis sin sur la manoj kaj rigardis en la okulojn de l' abomenaĵo.

Kaj en tiuj ĉi okuloj li ekvidis tremantajn ridkolerajn briletojn...

— Ve! mi rekonas vin — li murmuretis per estingiĝanta voĉo. Vi estas la *Malbona Volo!*

Kaj li falis mortinta.

La fantomo ektuŝis liajn manojn, kapon, bruston... kaj atendis...

— Malvarma — ĝi diris fine al si — li mortis, por ne konfesi, ke li mensogis!

Kaj trankvile ĝi stariĝis kaj foriris.

Super la malfeliĉa mortinto aŭdiĝis korvoj, pretiĝantaj al festeno... Nur vento bruadis ekĝeme...

El la Pola lingvo, tradukita de l'aŭtoro.


LEO BELMONT, (Polujo),

El la « Lingva Komitato ».



Kopirajto.

SUK EL BELAT.



Kl. Soler (Tuniso).

SUK DE L' PARFUMOJ.

La « Suk » en Tuniso

Por « TRA LA MONDO », de H. N. el « INSTITUTO DE KARTAGO ».

Tio, kio ŝajnas vere stranga en Tuniso, estas la komerca kvartalo de l'urbo araba; oni nomas ĝin la « Suk ».

La « Suk » (bazono) estas butiketaro, ĉe kiu la budoj estas ordigitaj laŭ la speco de komerco. En ĉiu butiketo vidiĝas magazenatablo, sur kiu sidas la vendisto kruciginta siajn kruojn kaj fumanta cigaredon.

Sur la stratetoj mallarĝaj, kie brilegas la oro de la brelokoj, armiloj, brodvestoj, kaj kie la speciala odorego de parfumoj orientaj mirigas la vizitanton, oni faris tegmenton per tabuloj malkunigitaj por eviti la varmegon. Kelkafoje, sunaradio ĝin traboras; tiam okazas impresio magia sur la neordinara multkoloro de la objektoj kaj de la viraro.

Oni aŭdas babiladon neintermpatan; ĉar, vestitaj per longa robo pale kolorigita aŭ per pantalone

blanka kaj tre larĝa, kapvestitaj per ruĝa « ŝeŝia » aŭ per grandega turbano, vendistoj kaj aĉetantoj senĉese disputadas per la plej diversaj dialektoj.

La Hebreoj kuras al la kliento; la Moroj plivolvas atendi kviete ĝin; la kafoservistoj — tra la popolamaso bruanta — transportas la varmegan trinkajon per ujoj el metalo formitaj tiel, kiel pipoj; la portistoj arabaj — kurbigitaj sub pezaj ŝarĝoj — vojiras; fine jen estas turisto, kies jaketo malgaja montriĝas apud la bazaroj luksegaj.

Kaj tiu ĉi fremdulo haltas, subite blindigita, ĉar la « Suk » al li jus malkaŝis la veran Orienton kaj ĝiajn personojn legendajn.

H. N., Tuniso.

Multaj Mahometanoj malamamas ke oni faras ilian portreton. Por eviti protestojn, Sinjoro Soler, la lerta fotografisto Tunisa, operaciis festatage tiam, kiam la komerco estis interrompita, por fari niajn ilustraĵojn.

Gaja rakonto pri fanfaroneco... kaj komercemo.

Pri fanfaroneco Marsej'a rakontas la ĉiam bonhumora Harduin redaktoro de « Mateno », Pariza ĵurnalo (Le Matin):

La ŝipeto naĝadis, puŝata de freŝa venteto, gaje tra la ondoj, kiam subite puŝo de malsupre ĝin levis rekte supren. La ŝipestro kliniĝinte rigardis sub la ŝipon kaj ekvidis kolosan balanon. Ĉar li estis de Marsejo kaj nomiĝis Marius, oni povas pensi, ke li, eĉ ne unu momenton, estis ektimigata. « Venu kaj vidu, li diris al la direktilisto, — la besto estas malsata. Aljetu al ĝi unu kordon da mandarinoj (speco je orangoj); eble ĝi ne nin ĝenos plu ». La direktilisto obeis: la baleno englutis la kordon da fruktoj, sed atakis denove la ŝipon. La direktilisto aljetis al ĝi unu benkon, kiu estis sur la ferdeko; la besto englutis la benkon, sed poste ĝi renversis preskaŭ la ŝipon! La situacio ekestis grava; grandaj decidoj estis necesaj. Marius ekprenis unu ĥinon, kiu troviĝis inter la pasaĝeroj, kaj jetis

lin rekte en la buŝegon malfermitan. La besto restis nesatigebla. « Kia apetito, Dio mia! » ekkriis Marius, jam preskaŭ malesperante. Tiam li rimarkis maljunan Hebreon apude starantan kaj rigardantan super la balustradon. Li kliniĝis, ekprenis lin je la piedoj, levis lin kaj jetis arkmaniere for de la ferdeko en la maron. « Se tiu fiŝego nun ankoraŭ estas malsata li diris nenio povos plu nin savi ». Bedaŭrinde ĝi estis ankoraŭ malsata. Sed ĉar Marius opiniis esti farinta al la besto sufiĉe da cedo, ŝajnis taŭgi, ke oni uzu forton. La baleno estis harpunata, alportata sur la ferdekon, kaj ĝia ventro malfermata. Kaj ĉu vi deziras scii, kion oni vidis tiam tie? La maljuna Hebreo sidis sur la benko kaj vendis ĉe tiu momento alla ĥino la mandarinojn! ».

Laŭ S^o HARDUIN (Le Matin).
Esp. KAROLO ZACHERL, Bavarujo.



Monologo

por Knabinoj.

De Fraŭlino ODILO PRUDENT (Francujo).

Fratinoj:

Malgrandaj kaj Maljunaj.



Ŝi volas ŝajni grava kaj kolera, malgraŭ riddeziro.

La fratinoj! La malgrandaj aŭ la maljunaj! Dio antaŭgardu vin je ili, se vi havas nenion. Ho ve! Mi havas du! Marto, la unuanaskitino, kiuntur-

mentas timego pro la kufo de Sankta Katerino. (*Malbonhumore*). Ŝi prenas (mi diras: *prenas* anstataŭ *uzurpas*) ŝajnojn de reĝino, en la domo. Ŝi konsentus ke ni estus ŝiaj humilaj servistinoj; ŝi ŝatus doni ordonojn al ni, kaj altrudus al ni siajn ideojn. (*Turmentata kaj grave*). Sed ho! mi estas tie, kaj, kelkafoje, ŝi devas ŝati miajn dezirojn, ankaŭ!

Due, mi prezentas al vi Odeton la « Malgrandan ». (*Malagrable*). Perfekta strangulino, kun nekomunaj diplomaciaj talentoj, dank' al kiuj la du pliaĝaj plenumas ŝiajn kvar kapricojn.

(*Ŝi ekĝemas kun kapskuo*). Ŝi havas la ideojn ĝuste kontraŭajn al tiuj de la aliaj.

Ekzemple, mi memoras kiel fervore, Marto kaj mi, deziris nian unuan longan jupon, apenaŭ en nia dekvina jaro. Nun! tiu-ĉi « malgranda » kiu-malgraŭ l' alnomo — estas supermezura stango, tute je kruroj (*gesto*) kaj brakoj (*gesto*), kiuj embarrasas ŝin — Dio scias kiom — obstine volas nur mallongajn robojn. Estas ridinde, je ŝia aĝo! (*ŝultroskuo*).

(*Malice*). Tial, ni imagis, kiel io tre prudenta kaj tre ŝerca, donaci al ŝi, por ŝia deksepa datreveno, jupon longan: (*kompleze*) ĉarman ŝtofon rozkoloran, mode tonditan; ravan! unuvorte.

(*Ŝanĝo de tono*): Kolerego de la « Malgranda »! « Ho, mi ne surmetos vian jupon! Ne tiel! Vi mallongigos ĝin; mi volas, ke vi mallongigu ĝin, aŭ, mi tondos ĝin! »

Rifuzoj! Ridegoj! Ni devigas ŝin per ĝi sin vestigi.

(*Paceme*). Mi konsentas: ŝi ŝajnas ja komika, tiu-ĉi « malgranda » kun sia jupo longa, — kaj ni antaŭdiras al ŝi, por inciteti ŝin ree, ke ŝiafaros multajn groteskajn saltojn, kiuj naskos por ŝi agrablegajn okazojn por ridegi pri ŝi. (*Paŭzeto*).

(*Natura voĉo*). Tiuj ŝercoj konsumitaj pri tiu ĉi temo, ni ne plu reparaĵis pri ĝi dum kelkaj tagoj. Sed, hieraŭ, antaŭ ol eliri al la kurso de desegno, kun la unuanaskitino, la « Malgranda », kun karesa vizaĝo, venas al mi. (*Petege*): « Ha, mia granda karulino, vi estus tiel ĝentila! Mallongigu mian jupon, mian beletan rozan jupon, mi petegas vin kaj mi promesas al vi, ke mi vestos min per ĝi morgaŭ, por la kuniĝo de la amikinoj de Loro. Dek centimetrojn, nur dek, vi scias; tio estos farita tiel rapide! » Mi ridetas, ne respondante. Ŝi kisas min kaj, ĉar mi faras simile, ŝi pensas, ke ŝia afero estas gajnita. (*Mistere*) « Precipe, diru nenion al Marto; estos petolajo kontraŭ ŝi, ŝiavice! » Kaj Odeto forkuras. — Tuj, mi komencas labori. (*Grave*) Konscience, mi mezuras la dek centimetrojn kaj mi tondas. (*Gesto*). Krr, krr. Kaj tondante, mi diras al mi mem: Mi estas malprava, mi estas tro indulgema; mi meritos riproĉojn de Marto. Esti kontraŭbatalinta ĝis hodiaŭ, por ke tiu ĉi knabino deksepe jara ŝajnu pli serioza, kaj cedi nun! (*Kapskuo*). Tamen, mi tondis. Des pli malbone! (*Gesto*) Krr, krr!

La bordero refarita rapide, mi kuŝigis la jupon en la ĉambron de la « Malgranda », ĵus kiam miaj fratinoj revenis domen. — Tuj kiam Odeto ekvidas ĝin, ŝi pensas, ke la korekto estas farita, kaj ŝi rapidas survesti sin per la jupo.

Hazarde, je tiu ĉi preciza momento, Marto malfermas la pordon. Mi aŭdas subitan ekridegon. Mi kuras al la ĉambro. Kaj jen ridego freneza prenas min. Mi elfalas sur kusenon, Marto jam kuŝas sur la kanapo kaj, antaŭ ni, staranta, Odeto tordigas je rido, kun jupo tro mallonga, kiu malkovregas ŝiajn tibiojn, ŝiajn kvadratajn tibikarnojn, kiujn la ridego skuas kaj konvulsias. Subite, ni ekkomprenas!

Nesciite de mi, Marto, unue estis detranĉinta dek kvin centimetrojn de la jupo; kaj, poste, mi, dek!

Post kelkaj minutoj je plena sveno, Marto havas ree sufiĉan spiron por diri al mi, meze de ridego, kiu rekomencas: « Vi do diris nenion al mi! » Kaj, kun sufokanta voĉo, larmoj en miaj okuloj, mi respondas: « Se vi estus tion dirinte al mi! »

(*Duone ridanta, duone kolera*):

La fratinoj, la fratinoj! La malgrandaj aŭ la maljunaj!

Originale verkita kaj ilustrita de OD. PRUDENT (Francujo).



DIVERSAĴOJ



La Vivado de Teoplantisto en Hindujo.

Verkita de Li mem.



Kopiraĵto NIA KUNLABORANTO.

Kial mi forlasis la Hejmon.

Kiel multaj aliaj Ang'loj — precipe la junuloj — mi, de longe malkontentiĝis je la tro-civilizeco de la Patrujo. Mi sopire deziris forlasi mian oficejan laboron en fumaja, troplenigita urbego, por agema vivado en la pura aero de la senlimaj, sovaĝaj landoj, transoceanaj. Mi volis anstataŭi la tramveturilon per la selo; la hejmajn altfasonaĵojn per pli simpla vestmaniero. Kaj mi deziris forlasi la malvarmon de Anglujo por la daŭra varmo de la Tropiko. Tial, kiam venis oportuna tempo, mi foriris por fariĝi Teoplantisto en Asam'o.

La vojaĝado tra Assam.

Pri la marvojaĝo Hindujojn, ne estas necese priskribi; ĉar, moderne, transmaraj rakontoj estas multenombraj kaj tre ordinaraj. Sed pri la vojirado al la teogardeno — mia estonta hejmo — mi devas iom paroli. De Calcutta (Kalkuta) mi veturis fervoje dum unu nokto, atingante frumatene la bordojn de la « Brahmaputra » riverego. Tiam okazis kvartaga vojaĝo per riversĥipo norden kaj orienten, el la provinco de Bengal en la provincon de Assam: kaj tiel

Jam de longe mi pensis ke priskribo pri teogardeno en tiu ĉi lando eble interesus la Esperantistaron, precipe la alilandulojn, kiuj ofte skribas al mi dirante ke ili rigardas Hindujojn kiel ĉarmegan landon kun multaj floroj kaj eterna sunbrilo: unuvorte — kiel «Paradizon».La

apero do de Tutmonda Revuo ŝajnas esti preninda oportuno por ebligi la eldonon de tia rakonto.

larga estas « Brahmaputra » en tiu ĉi regiono ke, iafoje, la bordoj nevidebligas. Noktomeze mi elŝipiĝis kaj pasigis la nokton en unu el tiuj dometoj, kiujn multenombre provizas la Registaro en tiu ĉi lando por nokte ŝirmi la vojaĝanton.

Matene, mi povis vidi la ĉirkaŭaĵojn: sed krom la sablaĵoj kaj kanaj vastaĵoj, nenio vidiĝis. La riverstacio konsistis el du flosaĵoj — unu elŝipiĝejo kaj unu loĝejo. Estas senutile starigi daŭrajn konstruaĵojn, ĉar la rivero estas ŝanĝema.

100 Kilometrojn per Elefanto!

Tre frue aperis, el la longa herbaĵo, la elefanto kiu devas min porti al la Tearbaro. Sidanta nur sur simpla sakaĵo, mi pasigis tri tagojn — tri longajn tagojn — sur la vojo. Tia skuega ruliga veturo okazis doloron ĉe la korpo kaj timon ĉe la spirito: ĉar la bestego, timante suriri la lignajn pontojn, ĉiam flankiĝis, trapaŝante la riverojn, kaj tute ne zorgis pri la profundeco de la akvo. Okaze, kaj senaverte, ĝi ekeniris la flankan arbaron; kaj disrompinte branĉojn, rapidege kaj danĝerige, ĝi svingis ilin per sia rostro, kio multe malplaĉis al la gvidisto.

Por la mango kaj ankaŭ por la noktaj haltoj, mi restis ĉe iu plantisto, kies teĵojn mi trapasis. Ĉar en Asam'o la kutimo inter la Eŭropanoj estas. — « Mia domo por ĉiuj, kaj ĉies domo por mi. »



Kopiraĵto.

KIEL ONI VOJAĜAS EN HINDUJO.

Situacio de nia Ĝardeno.

Je la tria tago mi alvenis nian Teejon kaj ekvidis ke ĝi estas vere ekster la mondo! Nur kulturigita peceto en la eterna « ĵunglo » (1)! La sola ligilo kun la eksteraĵo estas la ĉi tiea poŝtoŝtelo. — Hinda budo en kiu la poŝtestro mem estas Hindo. Ĉia korespondaĵo alportiĝas de 42 kilometroj per kuristoj!



Kopirajo.

POSTSIGNOJ DE L' « HOMMANĜANTO ».

La ĵunglo, kiu triflanke limigas la ĝardenon, estas la hejmo de diversaj sovaĝaj bestoj, precipe tigroj kiuj ofte eniras por ataki kaj forpreni laboriston. Norde, je 10 kilometroj, troviĝas la landlimo de Bhotan — tiu teruriga kaj ekskluziva regiono de nesuprenireblaj montegoj kaj nepenetreblaj arbaroj. Je la limo ekleviĝas la Montaro, vico post vico; kaj de la ĝardeno, la vidiĝo estas tre rigardinda. Efektive, ni vivas en la ombro de la « Himalajah » altaĵo.

La plantejo ja estas grandega: 5 kilom. longe kaj 2 kilom. larĝe, tute okupata de vicoj de te-arbetoj. Tiel vasta estas nia kreskejo kaj tiel diversaj la laboroj farataj, ke kvankam kunvivis tie ĉi kvar Eŭropanoj, tamen mi povas tuttage estadi ĉe la laborado sen renkonto.

Tag-ekskurso en Bhotan.

Ĉiam estanta esplorema, mi foje iris norden per la vojeto de la arbohakistoj. Alveninte la montetojn, kie ankaŭ tre ekdensiĝas la kreskaĵo, mi penis alten antaŭeniri por atingi la supron de la plej proksima montajo. Ŝajnis al mi ke estis nealta; kaj mi tre deziris de tiu videjo rigardegi la ĉirkaŭaĵon. Miaj servistoj tre klopodas por fari vojon hakante la bambuaron kaj la suprenrampan konfuziĝon: sed la laboro fariĝis tiel malfacila kaj tiel prokrastis la iradon, ke mi devis decidi ke tiamaniere la supro estas neatingebla. Tial, ni ĉesis la vojhakadon kaj procedis per la trairejoj de la ĵunglaj elefantoj. Tia irado estis tre facila ĉar kompreneble la pasadejo de sovaĝa elefanto restas pasebla por ia alia estaĵo. Sed malfeliĉe, tiuj ĉi subvojetoj tiel multiĝis, kaj pro iliaj interkruciĝoj tiel konfuziĝis nin, ke kvankam mi estis signinta la ĉefajn arbojn, ni apenaŭ povis refari niajn paŝojn.

La tria kaj sola praktika irmaniero estis utiligi la fluejon de rivereto kiu, je tiu tempo, estis preskaŭ senakva. La vojaĝado, kvankam torda kaj malrapida, certe proksimiĝis nin al la supro: krom kio, la arbflikoj kaj festona kreskajaro, la sovaĝaj bananoj kaj la plumaraj bambuoj, kune kun la mirindaj papiliejoj kiuj troviĝis tie, kien ajn enpenetris la brilaj sunradioj — ĉio kuniĝis por fari por mi feindlandon: ĉar ĝi estis mia unua vizito en la Tropikan ĵunglon.

Pasis la tago, sed mi ne povis plenumi mian deziron: ĉar la akvejo malgrandiĝis, la bordoj krutiĝis kaj kuniĝis kiel fendaĵo: kaj ni devis reiri la plantejon.

Pri la Gelaboristoj.

Inter nia kuliaro (2) troviĝas multaj diversaj rasoj ĉar ili estas eltiritaj el ĉiuj partoj de Hindujo: sed la plimulto konsistas el Bengal'anoj kaj provincaj Asam'anoj. Ĉe tiu ĉi ĝardeno kaj ĉe niaj du subplantejoj — kiuj troviĝas je interspacoj de 7 kilom. kaj 12 kilom., — loĝadas entute 4,000 Hinduoj, viroj, virinoj, kaj infanoj. Kompreneble, multe el ili naskiĝas, vivadas kaj mortas nur je la Tefarado. Ja, ĉiu ĝardeno similas al aparta reĝlando, en kiu la administranto estas la reĝo. Lia potenco estas ĉiamaniere absoluta; lia plej malgrava ordono — ĉu al Eŭropa subulo, ĉu al Hindo, — estas tute plenumata. Kun timego kaj granda respekto rigardas lin la kulioj,



Kopirajo.

KIEL ALVINAS NIA MAŜINARO.

ĉar li ĉion kontrolas. Li difinas ilian laboron kaj reguligas ilian salajron; li kreas kaj faligas rangulojn; li senprokraste juĝas iliajn malpacojn kaj punegas la kulpulojn; li starigas aŭ detruigas loĝejojn; kaj eĉ kontrolas iliajn edziĝojn kaj reguligas ĉe la vendejo la koston de ilia riza manĝaĵo!!

La moroj de niaj Hinduoj povas esti esprimitaj per unu vorto: simpleco. Ofte ili edziĝas tute sen ceremonio; sed la unuigo estas sincera kaj daŭra.

(Daŭranta).

Originale verkita kaj ilustrita de ALFRED T. SIMPER.

(1) Ĵunglo = Hinda vorto kiu signifas la originalan sovaĝan kreskajaron, ĉu arbaran, ĉu herban.

(2) « Kuli » oj = Hinda vorto kiu ĝenerale signifas « gelaboristojn ».



C Oxenford

La puntfarado en Anglujo

DE SINJORINO CARLILE.

La reĝo de Anglujo, Henriko la oka, ĉirkaŭ la jaro 1527^a deziris disiĝon de sia edzino, la reĝino Katerino Aragona, kaj tial li petis de la papo, Clemento la sepa, dekreton ke la edziĝo estas nula, kaj estis nula eĉ de la komenco. La papo ne volis ofendi la Anglan reĝon; sed ne malpli li volis ofendi la imperiestron, Karlon la kvinan, kiu estis la nevo de la Angla reĝino kaj nature ŝia defendanto. La papo do prokrastis: kaj dum ses jaroj la afero restis nedecidita. Fine Henriko forjetis la papan aŭtoritaton, kaj la eksedziĝo estis dekretata en Angla juĝejo.

Dum tiu longa prokrasto, aŭ almenaŭ de 1531 ĝis 1533, la malfeliĉa reĝino loĝadis kun sia sekvantinaro en malgranda urbeto, Ampthill en Bedford-a graflando. Malĝojaj pro la ĉiamaj duboj pri la estonteco, ili distris sian (nuon instruante la tieajn kamparajn virinojn pri diversaj specoj de bela kudrarto. Precipe ili konigis la tirfadenan kaj la kudrilan puntojn, (angle « drawn-thread work and point lace »; france, « point à jour et point d'Angleterre »), kaj reĝino Katerino ĝis nun estas konsiderata kiel la fondantino de la puntfarado en la meza parto de Anglujo. La festo de la puntfaristi-

noj, nomita Katerina tago, ĉesis esti solenata nur en la memoro de la estanta generacio.

Sed al Flandrujo la Angla puntfararto ŝuldas sian plibonigadon, se ne sian devenon. Dum la dua duono de la deksesaj centjaro multaj centoj da emigrantoj, forkurante pro la Hispanaj militoj kaj la religiaj persekutadoj en Malaltaj-Landoj (Holando), venis en Anglujon kaj disvastigis sian grandan lertecon pri la arto de kusena punto (angle, « pillow-lace »; france, « dentelle au fuseau » aŭ « dentelle du Puy »), kaj ĝis nun la virinoj en Buckingham-a, Bedford-a, Oxford-a, kaj Northampton-a graflandoj faras Flandran punkton. Multe da anglaj punktoj estas apenaŭ distingeblaj de la samtempa punkto de Ypres, Lille, kaj Valenciennes. Ankaŭ ekzilitoj de Holando alportis la arton en Devonan graflandon; sed tie oni trovas signon de posta Franca influo, kiun oni povas klare difini kiel deveninta de Hugonotoj elpelitaj de Alencon kaj Argentan per la Revoko de la Nantes-a Edikto. En Iriando, kie la arto estas praktikata kaj daŭrigita preskaŭ tute en monaĥinejoj, ĝi havas karakteron italan aŭ hispanan.

Esperantigis J. C. RUST,
Soham (Anglujo).

Higieno: La fenestro malfermita dum la nokto.

« Oni tro hejtas la domojn; la plej bona rimedo por bone farti estas vivi ne tro hejtante, kaj dormi en ĉambro aerumata per la fenestro malfermita. » Tia estas la sentenco, kiun oni aŭdas ĉie hodiaŭ. La modo, kiu ĉion ekkaptas, ne ŝanceliĝis ekkapti tiun noton, kaj multenombraj estas tiuj kiuj vivas en malvarmo, kaj kuŝiĝas en ĉambroj ne hejtataj, eĉ duon malferminte la fenestron, eĉ dum la plej rigore malvarmaj veteroj. Precipe de la tempo kiam oni kutimis kuraci la tuberkulozon per la senintermanka aerumado, tiu modo estas akceptita. Ĉu tio estas taŭga aŭ ne?

La rezultatoj devas respondi, kaj se oni atente ekzamenas la faktojn, oni estas devigata konstati, ke se la senintermanka aerumado havigas perfektajn rezultatojn, tio okazas kondiĉe ke la temperaturo de la ĉambro estu ĉiam je sufiĉa grado, almenaŭ +15 aŭ 16 centigradoj super la nulo; se la temperaturo malvarmiĝas, kontraŭe, la malsanulo ne ricevas bonan rezulton de tiaj vivkondiĉoj.

La varmo estas almenaŭ tiel necesa, kiel ankaŭ la pura aero, ĉar iaj temperamentoj, kiel la sennombra gento de la artrituloj, malfacile produktas varmon, kaj tre malfacile konservas iliajn organismojn je la fiziologia temperaturo. Konsekvence, estas eraro vivi senkomforte, en malvarma aero. Aerumu, vi estos prava, sed hejtu la ĉambrojn. Tro granda kvanto da bronkitoj estas konservataj de la personoj kiuj aerumas sin, kiuj kuŝas kun la fenestro malfermata, sed ne sufiĉe hejtas. Tiuj kiuj cerbe laboras, kaj kiuj pro tio mem suferas en la stomako devas pli ol aliaj malfermi al la malvarmo, ĉar ilia nutraĵo, ĝuste sufiĉa, ne estas kapabla doni al ili la rezervaĵojn kiuj povus produkti varmon.

El « La Vulgarisation Scientifique. »

D^{ro} P. GAMBIEP.

Verkita de MARCEL FINOT (Francujo).

Ĉu la generado spontanea estas utopio aŭ realaĵo? de pli ol 3000 jaroj, ĉiuj kiuj sin okupis pri la afero naturaj laboradis pri tiu ĉi interese ga problemo. Unuj certigis, per aprobeblaj tialoj, ke ĝi estas ebla; aliaj, per argumentoj same kredindaj, ke ĝi ne estas tia.

Ĉu la problemo estas solvebla? Kial ne? Esperimente, la demando estas jena: per ago de solaj fortoj naturaj, fizikaj au hemiaj, aliformigi la senmovan materion en organikan materion, kaj, se ni volas precizigi, ĉar la ĉelo estas la unua elemento de la materio organika kaj viva: 1^e krei ĉelon, 2^e ĝin kreskigi kaj vastigi, 3^e reprodukti kaj naski aliajn similajn ĉelojn.

La eksperimentoj de Pasteur, dum lia fama disputado kun Pouchet neniel elmontris ke la spontanea generado estas neebla. Ili pruvis nur ke la eksperimentoj de Pouchet ne estis precizaj, kaj ke tie ne estis generado spontanea. Pouchet kredis ke liaj kulturlikvaĵoj estis absolute senfruktaj; Pasteur pruvis ke tio ne estas vera, kaj ke, ĉiufoje kiam organismoj naskiĝas, ĵus la nevideblaj ĝermoj de l' aero tien estis alportintaj la vivon, kaj ensemintaj aŭ fruktigintaj la lokon pretenditan senfrukta». En aero reale kaj absolute senfrukta tute nenio naskiĝas.

De tiu ĉi batalado, oni preskaŭ tutmonde akceptis ke la vivo nur el la vivo devenas. Kiam nenia ĝermo viva antaŭekzistas, la organika materio estas nekapabla spontanee aliformiĝi, ĉu sen forto, ĉu per ago de ekstera forto, kaj iĝi vivantan materion, tio estas novan kaj superan substanco, posedantan, eĉ malmulte, la kapablon de movo, nutreco, kreskeco kaj reprodukteco, kiuj estas karakterizaĵoj de vivo.

Kelkaj scienculoj tamen pensis ke tiu ĉi certigo estas tro absoluta. Unuj certigis ke nenia materio estas senmova, kaj ke vivo malklara tremetas en ĉiu korpo, preta evolucii al pli perfektaj formoj, se nur iaj cirkonstancoj estos efektividitaj. Aliaj penadis krei materion vivantan, per ago de agentoj naturaj, fizikaj au hemiaj, sur diversajn kombinaĵojn de neorganikaj materioj. Kaj kelkafoje oni pensis trovi la solvon de tiu ĉi problemo. Sed, ĝis nun, nenio preciza, decidiga elnaskiĝis el tiu ĉi grandega penado.

Tamen, de kelkaj monatoj, oni parolis multe pri la eksperimentoj de iu juna scienculo angla, John Butler-Burke, de la Kambriga Laborejo. Eble al tiuj ĉi eksperimentoj oni povas riproĉi la samajn erarojn, kiel al tiuj de Pouchet, sed ni devas aldoni ke la radiumo ludas tie rolon, kaj de tri aŭ kvar jaroj, radiumo havigis al ni tiom da surprizaĵoj, malkovris tiom da neantaŭpensitaj mirindaĵoj, malfermis tiom da breĉoj en la maljuna konstruaĵo de niaj konoj, ke, per ĝi, oni povas ĉion kredi, eĉ la neversajnon.

S^{ro} Burke, do, certigas ke, se en tubo de gelateno antaŭe senfruktigita oni metas nur iom da radiumobromido, post 24 horoj aperas maldika membraneto supraĵa, kiu, iom post iom, kreskas profunde, kaj kiu, vidita per mikroskopo, konsistas el amaso el malgrandaj ĉelaj formoj.

Tiuj ĉi korpetoj ne estas vere, laŭ Burke, bakterioj au mikroboj, sed li estas tamen konvinkita ke ili

estas organismoj, kaj li ilin nomis « radioboj ». Ili havas kernon, tiel kiel protoplasmaj ĉeloj; ili kreskas, vastiĝas, naskas, per spontanea divido, aliajn korpojn similajn al ili, kaj kiuj havas samajn kapablojn. Sed tio ĉi ne tute pruvas ke tiuj ĉeloj estas mikroboj aŭ vivantaj organismoj, ĉar, transportitaj en alian tubon de gelateno, ili ne plu kreskis nek reproduktiĝis. Sed kio do estas tiuj ĉi radioboj? Estas eble ke, per radiumo, la angla scienculo estis havinta, ne *vivigemon* sed *ĉeligon* de gelateno; li eble aliformigis la gelatenon, senmovan materion, en artefaritaj ĉeloj, kaj faris ekorganikigon de la materio senmova.

Kvankam tiu ĉi fakto estus malpli grava ol la aliformigo de la gelateno en materion vivantan, ĝi estas tamen tre interesa, sed ne tute nova, ĉar jam de longe, per agentoj hemiaj aliaj ol radiumo, oni povis krei elementojn similajn al la organika ĉelo. Ĉelo konsistas el tri partoj: la ĉela substanco mem aŭ protoplasmo, la kerno kaj la kovertmembrano. Jam Dutrochet, per ago de elektra pila sur solvaĵo de albumeno, vidis albumenon disigantan, kaj kunigantan laŭ globetoj; tio estis unua paŝo de materio al organikigo. Antaŭ 40 jaroj, Trauber faris serion da precizaj serĉoj pri la artefarita formado de ĉeloj, kaj per simpla fizika procedo, li atingis formadon de veziketoj fermitaj, ĉirkaŭitaj de kovertmembrano, kaj kreskemaj. La procedo konsistis el kontakto de solvaĵo de gelateno kaj de tanikacido, aŭ de tanikacido kaj plumbacetato. Same, Rainey, en la jaro 1868^a, ricevis ĉelojn per mikso de solvaĵo de gumo kaj de zinkklorido.

Sed la plej kuriozaj el tiuj ĉi eksperimentoj estis tiuj de S^{ro} Leduc, profesoro en la medicina Lernejo de Nantes. Sur tavolo de gelateno metita sur vitrotavolo, li disjetas gutojn de likvaĵo precipitebla per kontakto, ekzemple gutojn de solvaĵo de kuprosulfato kaj kaliferocianido; kiam la likvaĵoj sin renkontas, kuproferocianido estas elfarata, kiu, precipitante, (1) faras perfektajn ĉelojn, je ĉirkaŭoj multangulaj, interne de kiuj oni trovas protoplasmon kaj kernon. Tiuj ĉi poliedroj, regulaj, tute apartigitaj unuj de la aliaj per muretoj, kun plasma likvaĵo kaj kerno, kiu estas guto, *difuzcentro*, ŝajnas absolute vere organika histo (2) je ĉela strukturo.

Plie, ĉiu ĉelo, dum sia formado, estas centro de movado molekula tre agema, konsistanta, kiel en vivantaj ĉeloj, el duobla fluado; la solvita substanco iras de la centra al la cirkaŭo, kaj la akvo de l' eksteraĵo al la centra parto. Tiun ĉi agemon molekulan, tiun ĉi vivon de artefarita ĉelo, oni povas daŭrigi, kiam oni ĝin metas en konvenan lokon, kie ĝi prenas la elementojn de sia nutraĵo.

Tial, per la formo, konstitucio, funkcio, la ĉelo kreita de la hemio neniel diferencas je natura ĉelo: ĝi kreskas kaj vastiĝas kiel ĝi, do ĝi efektividigas la du unuajn kondiĉojn de la eksperimenta problemo. Kio do mankas por ke la solvo estu eltrovita? Mankas la tria kondiĉo, la necesega kondiĉo, la reproduktebleco. Ni atendu! Kiom da milionoj da jaroj estis necesaj per ke la naturo mem vivigu sur la supraĵo de la globo la unuan maseton protoplasman!

MARCEL FINOT, el Longwy, (Francujo).

(1) Fr, *précipiter*; Ang, *to precipitate*; Germ, *Niederschlag*, *Präcipität*. (2) Fr, *tissu*; Ang, *tissue*.



La profesiaj soldatoj en Svedujo kaj ilia malapero.

Originala priskribo de JOHN LUNDGREN, el Hedemora (Svedujo).

Estis en la 17^a jarcento. Sveda regno partoprenis en la germana tridekjara milito. La ĉefa parto de la sveda militistaro ne konsistis el dungituloj, kiel la stato estis en aliaj armeoj tiamaj. La rekrutojn de la armeo oni prenigis el la loĝantaro. Deciditan tagon, la viroj de iu distrikto kunvenis antaŭ la provincestro kaj kelkajn oficirojn.

Oni partigis ilin je grupoj po dek, kaj el la grupoj oni elektis po unu rekruto. La restantaj naŭ grupanoj pagis kotizaĵon por lia provizo.

Se oni scias, ke 15 samaj rekrutigoj okazis en la daŭro de l' tridekjara milito, oni ankaŭ komprenos ke la nacio sentis tiun ĉi rekrutigmanieron kiel troŝarĝo. Plie la tiamaj cirkonstancoj kaŭzis oftajn falsajzojn kaj malĝustecon, spite la ebla kontrolo.

Do, por eviti tiujn ĉi rekrutigojn, la kamparanoj en pli kaj pli multaj provincoj komencis kontrakti kun la registaro, ke ili liveros deciditan nombron de ĉiamaj soldatoj. Tio ĉi estas



Sveda karikaturo.

la stariĝo de la malnova organizo de la sveda militistaro. Ĝi ricevis pretan formon en la fino de la sama jarcento, dum la regado de l' reĝo Karolo XI^a.

Plifruaj registaroj estis tro malavare fordonacintaj regnajn bienojn kaj impostojn, precipe al altaj nobeloj, kaj, por plibonigi la ekonomion de l' lando oni nun reprenis ilin. Tiamaniere granda nombro da pli-malpli grandaj bienoj revenis en regnan posedon.

La registaro decidis ke parto el ili estos loĝejoj

de oficiroj kaj suboficiroj. La impostojn de aliaj bienoj oni uzis por provizi rajdistojn kaj iliajn ĉevalojn. Rotojn el ŝipistoj oni fondis ĉe la marbordaj distriktoj, per kontraktoj kun la kamparanoj, kiel la armeajn infanterieregimentojn jam de tempo de l' tridekjara milito. Nur parte, por garnizona servado kaj en la almititaj landoj, oni uzis dungitajn soldatojn.

Ĝi estis la kamparo kaj la kamparanoj, kiuj liveris al la armeo ĝian ĉefan parton. La svedaj urboj en 17^a jarcento estis malgrandaj ankoraŭ pli ol nun. Tial ili estis preskaŭ sengravaj rilate al la rekrutigo de l' armeo.

Tiun ĉi organizon oni konservis ĝis nun dum pli ol du jarcentoj. Ĝi montrigis certa fundamento por starigi kvankam malgrandan tamen fidindan kaj bone disciplinitan armeon el profesiaj soldatoj. Tamen ĝi ne plu povis plenumi la nunajn postulojn pri taŭga armeo.

Plej grandan el ĝiaj malperfektaĵoj, la malfacilecon pligrandigi la armeon ĝis sufiĉa militforto, oni provis helpi per diversaj rimedoj, tiel en la lastkuriantaj cent jaroj per la komuna « defenddevo », kun mallongaj ekzercoj. La du malsamaj kategorioj de soldatoj tamen ne povis facile ligiĝi unu kun la alia, kaj tre klare oni tion eksperimentis ĉe la mobilizprovo en 1900^a. La junaj defenddevoj aperis devfidelaj sed tro malmulte ekzercitaj, kaj al la anaroj mankis unueco kaj dezirinda fortikeco.

Kaŭze de tiaj eksperimentoj la sveda parlamento en 1901^a decidis novan militorganizon, funditan sur la komuna devo, ke ĉiu viro en paca tempo akiru povon fari militan servon. La svedaj defenddevoj kaj historio estas samaĝaj — estas nur la sufiĉa ekzercdevo, kiu do estas nove decidita.

Laŭ tiu ĉi parlamenta decido la vakantaĵoj ne estos plu plenigataj, kaj la malnova profesia soldato do malaperos post ne longe.

De pli ol du cent jaroj, generacion post generacion, en paco kaj malpaco, li fidele servis sian laŭdon, kaj certe li meritis, ke oni longtempe konservos lin en la memoro kaj dankemo.

De naŭdek jaroj la nacio ne bezonis sendi siajn soldatojn en militon. Per propra sperto la nuna generacion ne povas rakonti pri militaj faroj de la sveda profesia soldato, sed liajn pactempajn agon kaj econ oni ankoraŭ konas.

Proksimume dudekjara la juna rekruto eniris en

militistan klason, kaj tie li restis plejofte ĝis la kvindekjara aĝo. Post la rekruta jaro, lia ĉiujara deĵoro ordinare konsistis nur el la ripetekzercado de la regimento dum kelkaj semajnoj en la somero, kaj la intertempojn li pasigis en sia hejma paroĥo, kie farmeto estis donita al li. Tia estis la kutimo; en kelkaj provincoj oni anstataŭis la farmeton per monsalajro, sed ankaŭ tiaokaze la soldato devis loĝi en la distrikto de sia roto.

La svedaj kamparanoj malofte posedas familiajn nomojn. Ili kutime estas nomataj laŭ la baptnomoj de siaj patroj. Sed en la soldataj tendaroj, kie oni per ĉiujara kunestado dum jardekoj intime koniĝis unu kun la alia, oni ne amus, ke tutaj rotoj konsistis nur el Filoj de Andreoj kaj Filoj de Johanoj. Do la rekruto, kiam li eniris en la vicon, ŝanĝis sian nomon, kaj la antaŭa « Filo de Petro » fariĝis aŭ Monto, Gojo, Kuraĝa aŭ alia substantivo aŭ adjektivo.

La soldatnomojn oni elektis el ĉiuj regionoj naturaj kaj spiritaj. Ĉiam ili ne ŝajnis konveni al siaj posedantoj. Jen oni vidis severulon, kies nomo estis Bona aŭ Ĉarma, jen trankvilulon nomitan Leono aŭ Batalo. Malofte oni laŭ sia propra gusto elektis nomon, ĉar kutime la nova rekruto ricevis ĝin kiel heredon post sia antaŭulo.

Antaŭ unu generacio, ĉesis la devo de oficiroj kaj suboficiroj loĝi en kamparo kiel iliaj subuloj. Ankaŭ poste, la rilato inter superuloj kaj subuloj tamen estis certe pli kora kaj amika en la sveda armeo ol en iu alia. Oni ne devas konkludi de tio, ke la disciplino estis malzorgata en siaj pligravaj detaloj, sed la egaleco de la aĝo kaj komunaj memoroj kaŭzis pli multan kolegenton ol estas eble en armeoj el junaj ekzercdevuloj.

Mi rakontos mallongan historieton, kiu tre karakterizas la spiriton de la sveda militistaro.

En regiono, kie maljuna ekskapitano loĝis, lia estinta regimento venis por manovro. Iu proponis al li viziti la provizoran tendaron, sed li rifuzis. « Ĉu vi kredas, ke mi deziras stari plorante kvazaŭ infano antaŭ mia malnova roto? »

La profesia soldato estis naskita en la kamparo, kaj kamparano li restis dum sia tuta vivo. Frue li

edziĝis, kaj la malgranda farmeto ofte donis panon al ok ĝis dek personoj. Partigita de la vilaĝo, la soldatfarmeto kuŝis jen en arbara rando, jen apud la vojo, kun siaj kampo, herbejo, terpomejo kaj paŝtejo. Sur muro de la dometo pendis tabulo montranta la numeron de la soldato kaj la nomojn de l' regimento kaj de l' roto. Eble oni vidis nudpiedan bubon, kiu portis trograndan soldatĉapon sur sia kapo. Sed, escepte tion, nenio en la eksterajo vid-

igis la militan okupadon de la mastro. Plej granda parto de lia vivo ankaŭ estis dediĉita al paca agado. Aŭ li estis helpanto de la vilaĝanoj por ilia kampkulturo, aŭ li laboradis kiel metiisto. Ĉe la kamparaj ĉarpentistoj, masonistoj, tajloroj kaj botistoj oni ofte trovis soldatojn, facile koneblajn per rekta *statur*o kaj barba vizaĝo.

El la kamparaj laboristoj, la soldato bone distingigis. Oni povas kondamni la militadon, kaj eĉ pensi kiel ajn pri militistoj, sed oni apenaŭ neas, ke la militista edukado plenumas ian taskon kulturalan. Per la ĉiujaraj ekzercoj, la soldato kutimis je ordemo kaj memtentado. Pro tio li estis estimata de siaj samklasanoj, kaj plej ofte li meritis tion.

La soldata servo estis tre ŝatata, kaj la rekrutigo do facila. Se tamen la farmeto estis tio, kio pleje logis, oni pro tio ne devas pensi tro malafable pri la juna rekruto. Ĉe juna aĝo ricevi sufiĉon da bezonaĵoj estas ja peninda afero en ankaŭ aliaj klasoj societaj. Tre ofte filo fariĝis posteulo de sia patro, kaj oni konas soldatfarmetojn, kiuj restis en la sama familio dum du cent jaroj.

Fremdaj oficiroj, kiuj ekkonis la svedan kamparan soldaton, estis tre mirigitaj pro lia vidiĝo. Certe neniu alia militistaro povas montri similajn vicajn, kie grizbarbuloj staras apud junuloj kaj mezaĝaj viroj.

La faroj de la sveda profesia soldato jam apartenas al la historio, kaj post ne longe ankaŭ li mem. La junaj defenddevuloj ricevas heredon el gloraj tradicioj, ne nur sangaj, kiujn oni nun kutimas rigardi kun ia antipatio, sed ankaŭ pacajn tradiciojn pri devseno, laboremo, kaj aliaj societaj virtoj.

JOHN LUNDGREN (Svedujo).



MALJUNA BRAVULO
Originala desegno de J. Lundgren.

La perdoj de la Rusoj dum la militado.

Jurnalo « *Razviest* » kalkulis la rusajn perdojn dum la dekkvar unuaj monatoj de la milito. La perdoj: mortintoj, vunditoj, militkaptitoj atingas la jenajn nombrojn:

en Cha-Ho	45,000	soldatoj
en Port-Arturo kaj Kiao-Ĉeu	45,000	»
en Liao-Jang	25,000	»
en Wa-Fan-Gu	4,000	»
en kelkaj bataloj	2,600	»
en Tu-Ren-Ĉen	2,700	»
en Se-Mu-Ĉen	1,900	»
en Da-Si-Ĉao	700	»
en Sich-Siassoem	360	»
en Hei-Ĉu	240	»
en la maraj bataloj (esceptinte la lastan)	9,800	»
en Sen-De-Pu	10,000	»
en Mukden	175,000	»

Sumigante tiujn nombrojn oni trovas ke Ruslando perdis dum tiuj dekkvar unuaj monatoj 335000 soldatojn (tri cent tri-dek kvin mil), mortintojn, vunditojn, kaj militkaptitojn, kaj cent mil resenditojn pro malsano, sume 435000 [ĉiutage 1,033].


Alia ĵurnalo « *La ĉoj de Kiew* » kalkulis la monperdojn dum la sama periodo; jen la rezultatoj:

Konstruado de la fervojo en Manĵurio:	258	milionoj da Rubloj.
Gardado de la fervojo kaj flankajoj	46	»
Perdoj okazigitaj de la Bokser'oj	70	»
Konstruado de Urbo Dalny kaj haveno	20	»
Ŝipareto por la konstruado de la fervojo	11	»
Konstruado de Port-Arturo	500	»
Sumo	905	»

Jen nun la elspezoj de la milito.	570	milionoj da rubloj
Eksterlandaj prunteprenoj	150	»
Obligacioj de la Trezoro	10	»
Perdoj je paflegoj (1480)	10	»
Ŝipoj konfiskitaj kun la enhavo	10	»
Ŝiparo detruita (antaŭ la lasta batalo)	100	»
Sumo	840	»

Do la monperdoj konsistis ĉirkaŭe el 1800 milionoj da rubloj, t. e. kvar miliardoj okcent milionoj da frankoj. [Ĉiutage 11.428.571 frankoj].

El « *La Vulgarisation Scientifique* ». Tradukis D. P. G.



Originala Novelo

De FRAŬLINO OXENFORD, el Brighton (1).

« Trankviliĝu, knabo, se mi estas sorĉistino, mi tamen ne manĝos cin. Ci restu ĉi tie ĝis kiam la ventego ĉesos; kaj tiam ci iros hejmen. Kie ci loĝas, kaj kion ci faris tiel malfrue en la arbaro? Ci devus dormi nun! »

La knabo, plorante, kvankam iomete rekuraĝigita per ŝia diro, ke ŝi ne manĝos lin, respondas: « Mi volis veni la arbaron de longatempe, sed mia patro ne min permesis, ĉar li diris ke la sorĉistino min kaptus kaj min manĝus; sed hodiaŭ, li iris la urbon, tiam mi atendis ĝis kiam mi ne plu povis lin vidi, kaj mi venis; sed — mi perdis la vojon, kaj — ho — mi... » kaj li multe ploras.

« Kiu estas cia nomo, knabo, kaj kie ci loĝas? — ŝi redemandas.

« Harry Evans, kaj mi loĝas ĉe la blankdometo ».

Ŝi eksaltas, « Dio de Ĉielo, lia filo! Dio, mi dankas vin »; tiel forte ŝi krias, kaj kun tiel terura esprimo sur sia vizaĝo, ke la knabo rekuras al la pordo. « Malsaĝulino! mi preĝis por la morto! Ha-ha-ha. Dio, vi estas saĝa, mi dankas vin — dankojn — dankojn! Lia filo, kaj li diris al la knabo, ke mi manĝus lin. Ho, la krueleco de la viro ». Nu, ŝi sin venĝos. Kion ŝi faros?

Ĉu ŝi portos la infanon en la mezon de la arbaro, kaj tie lin lasos morti? Ne, tio estus tro rapida. Ha! Ŝi kaŝos lin tiel, ke neniu krom ŝi mem lin povos trovi, kaj tiam — tie ŝi tenos lin tiom longe, kion ŝi vivos. Lin ŝi suferigos kiel ŝi suferis pro malsato, soifo, malvarmo; li vivu la vivon, kiun ŝi tiom longe vivis; li estu punata pro la peko de sia patro (Ho, saĝa Leĝo!); kaj tiam, kiam ŝi estos mortonta, li helpos ŝin iri la vilaĝon, kaj ŝi redonos lin al liaj gepatroj, sovaĝa, maltaŭga por vivi kun deca popolo. Ho! ĝi estus trans tio, kion ŝi estis iam imaginta. Ŝi residiĝas kaj sin perdas en siajn pensojn. La knabo, kuraĝigita de ŝia silento, revenas al la fajro,

kaj diras: « Plaĉu, donu al mi ion por manĝi, mi estas tre malsata. »

« Malsata! ha-ha-ha, ci estu malsata kiel mi estis malsata... kaj ofte estas. » Sed la vido de la malgranda pala vizaĝo kortuŝas sin kontraŭvole; kaj ŝi leviĝas kaj tranĉas pecon da pano, ĵetas ĝin al li, dirante, « Jen, ci havas! ci prenu, mi indulgos cin ĝis morgaŭ. » Samtempe ŝi verŝas duonon da malgranda kvanto da lakto, kiun virino estis doninta al ŝi, en malofta ago de boneco.

Li manĝis kaj trinkis avide, poste li kuŝiĝis apud la fajron, kaj baldaŭ ekdormis.

Ĉar la ventego iomete kvietiĝis, okazas kompare trankvileco. Judith sidas rigardanta la knabon. Ŝia vizaĝo malrapide moliĝas, kaj larmoj ekfalas de ŝiaj okuloj; ŝi ekĝemas kaj kovranta sian vizaĝon per la manoj, ploregas mallaute dum kelkaj momentoj; sed aŭdinte brueton, ŝi levas sian kapon, kaj trovas, ke la juna Harry rigardas ŝin kun miregeco.

« Mi kredis ke sorĉistinoj ne povas plori; Paĉjo tion diris. »

« Nu, ci vidas ke cia patro eraris, ili povas. »

« Mi tute ne timas vin nun », li diras, rampante al ŝi kaj komforte apogante sin kontraŭ ŝin; samtempe li prenas ŝian manon, kaj ĝin karesas dum li parolas. « Vi ne pli longe koleros kontraŭ mi, ĉu ne vere? »

« Infano, infano, mi ne koleras kontraŭ ci, sed kontraŭ tiuj, kiuj nomas min sorĉistino, kaj tiel, kruele agas kontraŭ mi. Dio helpu min! Mi intencis fari al ci malbonaĵon, sed malgraŭ ĉio, mi estas virino — mi ne povas... ci estas tro simila al cia patro. »

Dum ŝi parolas, ekbrilego kaj ekbruego montras, ke la fulmotondro jam ne forpasis; kaj denove la ventego rekomencas. La knabo, tremante pro timo, apogas sin pli proksime.

« Ne timu, karega, ci estas sendanĝere tie ĉi.

(1) Sekvo kaj Fino. Vidu la Nojn 6an kaj 7an.

Ŝi ĉirkaŭprenas lin kaj lin sidigas sur siajn genuojn. Ŝiaj okuloj pleniĝas je larmoj ĉar ŝi pensas pri sia propra malfeliĉa infano, lia duonfratino, kiu mortis preskaŭ tuj post sia naskiĝo. La penso iom remalmoligis ŝian koron, sed ĝuste tiam li reparolas: « Ĉu vi donos al mi alian pecon da pano, kara sorĉistino? »

« Kiel! Ci estas ankoraŭ malsata, etulo? » demandas ŝi ŝajnigante miron.


Ŝi formetas lin el siaj genuoj, kaj iras tranĉi pli multe da pano; sed apenaŭ ŝi prenis la tranĉilon en sia mano, kiam la maljuna pordo estas trapuŝegata de ekblovego de l' vento. Ŝi tuj ekkuras por ĝin fermi, sed subite la fulmo ekbrilegas ĉe la enirejo kaj ŝi falas teren, mortinta. Dio kompatis ŝin kaj sendis sian anĝelon porti pacon en ŝian malfeliĉan turmentitan animon, antaŭ ol ŝiaj turmentantoj povos atingi ŝian loĝejon, kiun ili serĉas esperante tie trovi la knabon.

Ĉirkaŭ duonhoron poste, ili alvenis kaj trovis lin en angulo, timigita, preskaŭ mortinta vidinte la virinon fali, la subitan silenton, kaj la sekvintan tondron. Apud la enirejo kuŝas la korpo de Judith, bruligita, kaj nigrigita, ankoraŭ tenanta en la mano la tranĉilon torditan kaj tute senformigitan.

« La juĝo de Dio al la sorĉistino! » kriis ili, « ŝi estus mortiginta la infanon »

Kaj kvankam li parolis tre ofte pri la bona sorĉistino, kaj ripetis ŝiajn vortojn, neniam ili ŝanĝis sian opinion, tiel malfacile estas ŝanĝi malfavoran antaŭjuĝon. Nur lia patro kredis lin, ĉar fine li vidis per pli klaraj okuloj.

*Originale verkita kaj ilustrita de
C. W. OXFORD, (Anglujo).*



Vojaĝoj kun laŭvolaj trajtoj

de Franclando en Algerion kaj en Tunisio aŭ reciproke.

Dum la tuta jaro estas liverataj libretoj de 1^a, 2^a, 3^a klaso, por efektiviĝi per pli malkara kosto, veturadojn povantajn enhavi trajtojn sur la jenaj fervojoj *Paris-Lyon-Méditerranée, Est, Etat, Midi, Nord, Orléans, Ouest, P. L. M. Algérien, Est Algérien, Bone-Guelma, Sfax-Gafsa*, kiel ankaŭ sur la *marvojoj uzataj de la Compagnie générale Transatlantique, de la Compagnie de navigation mixte (Comp. Touache)* aŭ de la *Société générale de transports maritime à vapeur*.

Tiuj vojaĝoj, kies trajtoj estas antaŭe difinitaj de la vojaĝantoj mem, devas enhavi samtempe kun francaj trajtoj, ĉu marveturadojn, ĉu marveturadojn kaj algeriajn aŭ tunisiajn trajtojn. La trajto sur la fervojoj francaj devas konsisti el 300 kilometroj almenaŭ aŭ esti kalkulita po 300 kilometroj almenaŭ. La marveturadoj devas esti efektiviĝataj ekskluzive per vaporŝipoj de sama societo.

La trajto devas realkonduki la vojaĝanton al lia deirpunkto.

Knaboj. — Kiam ili estas malpli ol tri jaroj aĝaj, la knaboj nenion pagas, kondiĉe tamen ke ili estu transportataj sur la genutoj de la personoj, kiuj ilin akompanas.

De tri (is sep) jaroj, la knaboj pagas la duonon de la kosto, kaj havas la rajton por aparta sido, sur la fervojoj, kondiĉe ke en sama fako, du infanoj je tia aĝo povos uzi nur la lokon de unu vojaĝanto. Sur la vaporŝipoj, la infanoj de tri ĝis sep jaroj aĝaj, devas uzi la kuŝejojn de la personoj kun kiuj ili vojaĝas; tamen, du infanoj je tia aĝo, havas rajton por unu kuŝejo; kiam ili estas pli ol sepjaraj, la infanoj pagas la tutan koston.

Daŭro. — Tiuj libretoj estas valoraj dum 90 tagoj, ne alkalulante la tagon de la deiro. La daŭro povas esti plilongigita

po unu, du aŭ tri periodoj de 30 tagoj, per la pago de aldono egala al 10 % de la kosto de la libreto, por ĉiu plilongigo.

La vojaĝanto povas halti ĉe ĉiuj stacioj de la trajto.

Pakaĵoj. — La libretoj donas la rajton, sur la fervojoj, por la senpageco de pakaĵoj po 30 kilogramoj por ĉiu persono, kaj po 20 kilogramoj por ĉiu infano de tri ĝis sep jaroj aĝa. — Sur la vaporŝipoj la pasaĝeroj havas la rajton por la senpageco transporto po 100 kilogramoj da pakaĵoj en la unua klaso, po 60 kilogramoj en la dua, kaj po 30 en la tria. Tiu senpageco estas duonigita por la infanoj de tri ĝis sep jaroj aĝaj.

La pakaĵoj povas, ĉe la deiro de Parizo kaj Lyon'o esti enskribitaj senpere por la havenoj de Algerio aŭ Tunisio.

Peto de libretoj. — Por tiuj petoj, oni povas sin turni al la stacidomestroj ĉe ĉiuj stacidomoj de la fervojaj societoj partoprenantaj, almenaŭ kvin tagojn antaŭ la deira tago.

Grava Avizo.

La plej plenaj informoj pri la rondiraj vojaĝoj (kosto, kondiĉoj, kartoj kaj vojaĝplanoj) kiel ankaŭ pri la Bilettoj simplaj kaj tiuj por aliro kaj reveno, abonkartoj, la horaro, la internaciaj rilatoj, k. t. p., estas enskribitaj en la Livret Guide Horaire P. L. M. kiu estas vendata po kvindek centimoj, ĉe la stacidomoj, oficejoj en la urboj, kaj ĉe la bibliotekoj de la stacidomoj de la fervoja societo. Tiu libreto estas same sendata interŝange je 85 centimoj senditaj per poŝtmarkoj al la centra oficejo de la ekspluatado P. L. M. (publikigo) 20 Boulevard Diderot, Paris XX^e Arrondissement.

M. P. G.

Nia enketo pri ĉiulandaj edukejoj

instigis longan artikolon de franca « Esperanto », en kiu la aŭtorino insistas pri la utileco de tiaj enketoj « kies rezultatoj, tradukitaj en naciajn lingvojn, povos esti nova kaj valora armilo en la manoj de niaj kunbatalantoj, montrante al skeptikuloj novan utilon de Esperanto ».

Jes kondiĉe ke tiuj, kiuj same pensas, partoprenu en ĝi. Ni ricevis artikolojn de finlandaj, amerikaj, bohemiaj, francaj instruistoj aŭ lernantoj, kelkaj kun tre kuriozaj ilustraĵoj; aliaj estas promesitaj aŭ espereblaj de Algerio, Germanujo. Tio ne estas sufiĉa. Oni bonvolu pripensadi la sekvantajn liniojn eliritajn el la preparolita artikolo de « Esperanto ».

« Ĝis la lastaj jaroj, tiuj enketoj deĝive limiĝis al unu lando aŭ pli ĝuste al personoj parolantaj unu lingvon, do ili estis esence naciaj, kaj konsekvence neplena pri la temoj prezentantaj ĉiulandan intereson.

Sed kiu senlima ekflugilo ili estus povintaj kaj devintaj preni tiuj kiam ekzistis en ĉiuj landoj homoj uzantaj saman komprenilon. Kiel estus interesa komi la opinion de homoj tiel mal-similaj, almenaŭ laŭ la ĝenerala kredo, kiel Francoj kaj Ĥinoj, Angloj kaj Rusoj, Germanoj kaj Hispanoj, Svedoj kaj Japanoj k. t. p. »

Jes, kaj ni esperas ke ĉiuj kiuj havas ion interesan por skribi pri nia demando ne ŝanceliĝos ĝin fari. Ne estas necese fari plenan raporton; iu fakto, iu anekdoto kunmiksita kun aliaj de diversaj devenoj povos ebligi utilajn komparojn kaj estos certe valora ŝtofo en la lertaj manoj de P^{ro} Rousseau (1) kiu

(1) P^{ro} Dro Rousseau, 1, l'abbourg de Bouze, Beaine, Francujo.

alcentrigas la respondojn. Se la raporto povas esti tiel interesa kaj plena, kiel ĝi devas esti, ni aparte eldonos ĝin; aliparte ni ankaŭ faros specialan presadon de l'plej rimarkindaj ilustraĵoj, laŭ formo de poŝtaj kartoj donacotaj al iliaj aŭtoro aŭ sendinto.

T. L. M.

Al niaj legantoj.

Eldono luksa. — Kiel ni ĝin skribis en la 7^a n^o, oni povas ĝin havigi de l' 6^a numero sed, kompreneble, se malnovaj abonintoj deziras ricevi la 6^{an} kaj 7^{an} duoble, ili devas pagi plue la koston de 2 n^{oj}. La aldono unufranka estas por la papero kaj la dua unufranka aldono por la kosto de l' tuboj.

La Kvaronaraj Abonoj komencas je ĉiu kvaronjaro, de la monatoj Januaro, Aprilo, Julio, Oktobro.

Oni bonvolu sendi la koston de l'abono renovigo ĉiam-niere ke ĝi alvenu antaŭ la sendo de l' numero sekvonta la lastan pagitan, aŭ almenaŭ KAD NEPRE skribi antaŭ la jus dirita templimo, por sciigi ke oni daŭrigas la abonon. Neplenumo de tiu kondiĉo okazigos la nericevon de la revuc.

La Administracio.

La Bona Pomvino

estas ege trinkinda! Ĝiaj gustume konsumantoj estas multaj, ĝiaj prave konsumantoj devus esti ĉiuj la aliaj, ĉar la drinkantoj de bona pomvino neniam timas la malsanadojn tiajn, kiaj la urina sablero, la gravelo kaj eĉ la podagro aŭ la reŭmatismo.

Sendadoj en ĉiujn landojn. Petu prezaron kaj sendmanieron al la « Cidrie de Tabago », St-Nicolas de Redon, Loire inférieure, France.

Esperantaj slosiloj.

Mirindaj broŝuretoj ne pezaj (5 gramojn), enhavantaj regulojn de Esperanto kaj « vortaron ebligantan tuj kaj senpre- pare deĉifri kaj legi ĉion esperante skri- bitan » Enmetebaj en leteron sen pligo de la poŝtkosto.

Jam estas pretaj la angla, germana, franca, itala, sveda, eldonoj kaj receive- blaj po

3,50 frankoj la centon (100).

Tre rekomendindaj por la propagando Ĉiulandaj poŝtsignoj estas akceptataj laŭ la efektiva valoro.

Les Annales politiques et littéraires.

Jare: 10 f. — 15, rue St-Georges, Paris.
Abono: 10 fojojn repagita per la profitoj de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l' reciproka apogo de Annales).

F. SOLER.

Fotografistoj de lia mosto « Le Bey » 10, Avenue de France, Tunis.

Fotografajoj kaj artistaj poŝtkartoj.

Gazetaro.

Ni transsendas al la jenaj revuoj abonojn akompanatajn de la abonkosto. — Aldoni 10 centimojn por la transsendo de la mendo.

L'ESPÉRANTISTE.

France kaj esperante redaktata, oficiala revuo de la S f p E: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriloj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiujspacaj esperantistaj verkoj. Abono: Francujo 3 fr.; alilande: 3,50 fr. Administracio: Louviers, (Eure), France.

GERMANA ESPERANTISTO.

Organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj (ĉiumonate). Redaktata germane kaj esperante. JARABONO: 3 f. 75 Administracio kaj Redakcio: Esperanto Verlag, Möller & Borel, Berlin, S., 95, Prinzen strasse.

ESPERANTO.

(Ĵurnalo): France kaj esperante. Unu numero 10 cent., 24 noj sinsekvaj 3 fr. Ĉe So Paul Berthelot, Céret, P. O., France. Tre rekomendinda al francalingvaj samideanoj. Aĉetebla en ĉiuj stacidomoj kaj ĉe l' kioskoj por vendado de ĵurnaloj.

SUNO HISPANA.

Hispane kaj esperante. Tre grava monato revuo por la propagando de Esperanto en hispanlingvaj landoj, bonege redaktata sub direktado de A. Jimenez Loira. Rakontoj pri hispanaj kutimoj kaj tradukoj laŭ famaj hispanaj aŭtoroj. Abono 3 fr., unu numero 30 cent Administracio kaj redakcio: Avellanas, 11, presejo — Valencia (Espana).

ESPERO PACIFISTA.

Monato organo de l'Esperantista Societo por la Paco. Jara abono (aŭ minimuma kotizo al la Societo), 5 frankoj. Krom avizo kontraŭa, la abonintoj estas konsiderataj kiel aliĝintoj al la Societo; tiu ĉi akceptas aliĝojn opajn. Sin turni al S^o Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

THE BRITISH ESPERANTIST.

oficiala monata organo de la Brita Esperantista Asocio; 12 paĝoj da novaĵoj, k. c., anglo-Esperante, kaj 8 paĝoj da Aldono tute en Esperanto. Jare 4 fr. (sen Aldono 2 fr.) — Oni abonas ĉe la Sekretario de la B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

MEKSIKA LUMTURO.

Hispane kaj esperante. — Organo de la Meksika societo por propagandi Esperanton.

Eliras 6 fojojn jare — 3 frankojn — Ĉe D^o A. Vargas, Santa Rosa Necoxtla (Ver), Meksiko.

SVISA ESPERO.

France kaj esperante — 2 fr. — Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

Sendu mendojn kaj anoncojn kun poŝtaj mandatoj al « Administranto de Tra la Mondo », 15 Boulevard des 2 Gares, Meudon (S. et O.), France, antaŭ la 10^a de ĉiu monato, por la venonta numero.

ĈIAM TRE LEGBLE SKRIBU.

GÉRANT : EUGÈNE CAPÉ.

A. J. WITTERYCK, Presisto, Bruĝo.

LINGVO INTERNACIA

Monata esperanta revuo. Fōndita en 1895. Literatura kaj propaganda tute en Esperanto.

Abono 7,50 fr. ĉiulande. Unu numero 0 f. 50. Abono estas akceptata de l' komenciĝo de ĉiu monato.

ANTAŬEN ESPERANTISTOJ.

Hispane kaj esperante. — Organo de la Perua esperantista societo — 3 fr. — Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro. Calle Lártiga, Lima (Peruo).

ESPERANTISTEN.

Svede kaj esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stokolma Klubo. Tre subteninda por helpi esperantistan movadon en Svedujo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm.

3 fr. 75 ĉiujare; aparta N^o: 35 cent.

ĈILIO ESPERANTISTA.

Senpaga organo propaganda, hispane kaj esperante.

Ĉe So L. E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1989 (Santiago-Chile).

ESPERANTO.

Hungare kaj esperante. Scienca kaj literatura.

4 fr. ĉiulande. Ĉe S^o Marich Agoston, Papnővelde-Uteza 6, Budapest, IV. (Hungarujo).

RUSLANDA ESPERANTISTO.

Ĉiumonata organo de la S-to «Espero» en lingvoj Esperanta kaj parte en rusa — Diversspeca, interesa kaj bonstila literatura materialo: artikoloj pri la problemoj de lingvo internacia kaj pri Esperanto; vasta kroniko de Esperantista movado (propraj korespondantoj) kaj bibliografio; social-politika fako; novaj famaj beletristikaĵoj (interalie en 1906 j. estos presata la « Ruĝa Rido » de L. Andrejev), versaĵoj kaj mult. al. — La detalaj prospektoj estas riceveblaj, senpage. — La jara abonpago (kune kun membriĝo en la S-to «Espero») — 3 rubloj (7 fr. 50 cent.) — Adreso: Ruslando, S^t Peterburgo, B. Podjaĉeskaja, 24, al la S-to «Espero.»

ESPERANTA LIGILO.

Monata revuo por blinduloj per esperanta Braille-sistemo. 3 f. — Ĉe So Cart, 12 Rue Soufflot, Paris.

ESPERO KATOLIKA.

Tute esperante. Unu N^o afrankita 0 f. 30 Francujo, 2 f.; alilande 2 f. 50. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France).

LA MIÉLINE GELSON

MIRINDA RIMEDO KONTRAŬ

La Falo de l'Haroj

Ĉe ĉiuj bonaj kombistoj kaj ĉe

FERRÉ, BLOTTIÈRE et Cie

102, rue de Richelieu, Paris.



ĴUS APERINTA!

FRANÇOIS COPPEL

Unua Ĉapitro

de miaj memorskriboj

ESPERANTIGITA DE

AUGUSTE MONTEZIER



PREZO: 75 CENTIMOJ

PARIS

ALPHONSE LEMERRE, ELDONISTO

23-25, PASSAGE CHOISEUL, 23-25

M DCCCXV

Ĉarma verketo de l' fama franca akademiano, kun antaŭparolo tute aproba por Esperanto.

Ĉe « Tra la Mondo ».

Belegaj propagandaj poŝtkartoj kun vidaĵoj de Alĝerio;

1 fr., afrankite, ĉiu dekduo.

Propagandaj poŝtkartoj de « Tra la Mondo », fr. 1,50 ĉiu cento.

Ĉe « TRA LA MONDO ».